


CERBE kaj KORE



N-RO 15 (83), JUNIO 2020

**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 113**

Enhavo


Vladimir Samodaj – 85-jara!

<i>Vladimir Samodaj</i> . 85. Resumeto	4
Fotoverkoj de Vladimir Samodaj	8
<i>Jubileaj dediĉoj</i>	
<i>Klara Ilutoviĉ</i> . Al V. V. Samodaj	17
<i>Ludmila Novikova</i> . Jes, mi ĉiam vias, mia mistera mister Esperanto	18
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . Dediĉoj al V. Samodaj diversjaraj	
Interparolo de la malnovaj amikoj	20
Por la jubileo de V.V.S	22
Por V.V.S.	23
Al VVS	24
Al V.S.	25
Samodaj	26
Al VVS	26
<i>Valentin Melnikov</i> . “Cerbe kaj kore”– ido de Vladimir Samodaj	27
Poezio. Kanto de <i>Mikaelo Povorin</i> laŭ poemo de <i>Vladimir Samodaj</i>	28
<i>Originala poezio</i>	
<i>Nikolao Neĉajev</i> . Fluo	29
Optimismo	29
Maljunulo	29
<i>Klara Ilutoviĉ</i> . Ni atendu	29
Al 180-jariĝo post naskiĝo de P. I. Ĉajkovskij	30
<i>Tradukita poezio</i>	
<i>Ludmila Olifirova</i> . Steloj super Rusio <i>Trad. L. Novikova</i>	31
<i>Andrej Rogov</i> . Kelkaj tradukoj el la ukraina	52
<i>Originala prozo</i>	
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . El Kronvirusaj noveletoj	32
<i>Tradukita prozo</i>	
<i>Artjom Belov</i> Partneroj. <i>Trad. Sergej Dmitrenko</i>	36
<i>Historio</i>	
Ili batalis kontraŭ nazioj en la 2-a mondmilito	
<i>Vera Androĥanova (Podkaminer)</i> Mia avo Semjon Podkaminer	42
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . Andreo Rogov kaj lia neefektiviĝinta revo	46
<i>Humuro</i>	
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i> . “Poŝtelefono estas ja atingo...”	54

Vladimir Samodaj 85-jara!



La 17-an de junio 2020 Vladimir Vladimiroviĉ Samodaj fariĝas 85-jarulo. Lia vivo estas riĉa je eventoj, kaj multaj atingoj de nialanda Esperanto-movado kaj kulturo ŝuldas al liaj grandaj laboroj. Movada organizanto, poeto, redaktoro, eldonisto, teatro-esperantiganto, fotisto... Pri liaj atingoj oni povas ekscii el liaj libroj, kaj el lia propra rakonto, kiun eblas legi sube.




85. RESUMETO

Vladimir Samodaj

Jen venis al la fino la okdekkvina jaro de mia ekzisto. La cifero estas bagatela, tamen, ŝajnas, indas resumeti provizore, Sed kio meritas esti notita, kio povas interesi legontojn? Mi ne scias, ne imagas. Pardonu do, se mi elektis ne tion.

Mi ne rakontu pri la milita infaneco, pri la postmilitaj malsataj jaroj. Tio estis historio de nia tuta lando.



Aleksej Iljiĉ Verŝinin legas la provnumeron de «Moskvaj Novaĵoj» en Esperanto. Odeso, 1989

Esperanton mi, preskaŭ 23-jara, eklernis la 10-an de aprilo 1958 en Odesa Domo de sciencistoj, en la Esperanto-sekcio, kiun gvidis Aleksej Iljiĉ Verŝinin (1907-1990), veterano de la Granda Patrolanda milito, kapitano de la tria grado (flota majoro), antaŭmilita membro de la Prezidio de SEU – Sovetrespublikara Esperantista Unio.

Tiutempe, post 3-jara servado en armeo kaj kelkmonata hejstata laboro en

glacirompa ŝipo, mi estis laboristo en Odesa ŝipripara uzino numero 2. Esperanto, certe, estas afero interesa, tamen por mi ĝi ne estis sufiĉa, do samtempe mi lernis aŭtodidakte, memstare do, ankaŭ la anglan kaj la italan lingvojn. En E-sekcio mi konatiĝis kaj amikiĝis kun Anatolo Gonĉarov, kiu tiam studentis en Odeso.

Septembre 1960 mi fariĝis studento de Instituto de orientaj lingvoj (ИВЯ, nun ИСАА – Instituto de aziaj kaj afrikaj landoj) ĉe Moskva ŝtata universitato (МГУ), kaj tio kaŭzis disdubiĝon de mia persona vivo – Esperanto (por la animo) kaj araba lingvo (por la vojo profesia). En la unuaj studentaj jaroj mi instruis en la instituto Esperanton kaj la araban en Moskva Domo de pioniroj. En la E-grupo estis, se mi ne eraras, 16 personoj, la plej diligenta lernanto estis Anatolij Nikolaevič Zubkov, instruisto de hindiaj lingvoj, kiu poste fariĝis la unua diplomita jogo (jogano) en Soveta Unio (vidu «Serbe kaj Kore» n-ro 14(82), 2020, pp. 52-53).

En februaro 1964 mi estis sendita por



praktiki araban lingvon en Alĝerion, tamen en tiu araba lando la popolo ne parolis arabe pro la 132-jara franca regado, do oni sendis min de tie en Nordan Jemenon, aŭ Jemenan Araban Respublikon.

Ekzistis ankaŭ Suda Jemeno, kie regis angloj. Post iom da jaroj la angloj estis devigitaj forlasi ĝin. Formiĝis Popol-Demokrata Jemena Respubliko – NDJR. La du Jemenoj longe malpacias, sed en 1990 unuiĝis.

Interesega lando estis tiutempe Norda Jemeno, mirinda, fabela lando de «Mil kaj unu noktoj».

Esperanto? Preskaŭ nenio. Nur iomete:

*Super la mar' senlima krias korŝire mevo.
Tio animo mia vian animon vokas,
Vokas, sed sen respondo,
krias, sed krioj ĝiaj, je la dolor' abundaj,
Dronas, neekaŭditaj, en la ĉielo vasta,
en la pofunda maro...*

Ne, ne nur tio. Estis ankaŭ rememoroj pri Alĝero.

De tie mi korespondis kun Anatolo Gonĉarov, perletere ni la unuan fojon tuŝis la problemon pri foresto de Esperanto-organizaĵo en Soveta Unio.



**Konstantin Miĥajloviĉ
Gusev kun sia edzino
Ludmila Ivanovna**

Samjare mi aliĝis al la teatra studio de la universitato kaj post kelka tempo proponis esperantigi iun el ĝiaj spektakloj kaj montri ĝin en Junulara E-kongreso en Hungario. La aventuro sukcesis, en 1966 ni ludis la spektaklon «Cimo» de Majakovskij, kiun brile esperantigis K.Gusev. Sekvajare ni prezentis la spektaklon en kvar urboj en Pollando, kio permesis krei E-klubon en la universitato.



**V. Samodaj
en la spektalo «Cimo»**

En 1965 mi subtenis la ideon de A.Gončarov krei junularan E-kolektivon kaj proponis nomi ĝin Soveta esperantista junulara movado (SEJM). La propono estis akceptita, SEJM funkciis ĝis la fondo de ASE (Asocio de sovetiaj esperantistoj) en 1979 (antaŭ tio ni ne uzis la vorton «sovetia»).

Ioman tempon mi laboris en Ministerio pri supera klero, poste en Centra komsomola lernejo, partoprenis, sola esperantisto el Soveta Unio, en Internacia Festivalo de junularo kaj studentoj en Sofio en 1968.

Fine de la jaro 1968 mi forveturis labori en Sirion en la Komerca reprezentejo (Торгпредство) kiel interpretisto. Mi devis labori tie ne malpli ol tri jarojn, sed forveturis post 18 monatoj pro familiaj cirkonstancoj.

Reveninte mi ricevis proponon de profesoro Jevgenij Alekseviĉ Bokarjov (1904-1971), prezidanto de E-komisiono, okupiĝi pri eldona laboro, ĉar K.Gusev lasis tiun postenon. Do mi daŭrigis tiun laboron, tamen ĝin obstine bremsis «respondeca» (vere, tute ne deca) sekretario de E-komisiono Anatolij Berjoza, senkaŝa kontraŭulo de esperantistoj. Sed mi sukcesis konvinki SSOD-estrojn eldoni E-suplementojn al la gazeto «Moskvaj Novaĵoj». Estis eldonitaj 12 numeroj (11 kajoroj, la lasta duobla) kun la kvanto de 5 kaj 10 mil ekzempleroj, kio ricevis pozitivan reĉhon en eksterlando. Esperantistoj, tradukantaj la tekstojn, eĉ ricevadis honorarion.



En la Unuigita redakcio (redaktejo) «Moskvaj Novaĵoj» mi eklaboris en 1971, en ĝia arablingva versio. Mia posteno nomiĝis «kontrola redaktoro» kaj la tasko estis kontroli tradukojn de la ruslingvaj tekstoj al la araba. En 1973-74 mi laboris en Irako kiel interpretisto en grupo de sovetiaj specialistoj pri planado.

Jakov Alekseviĉ Lomko

La gazeto aperadis en kvar lingvoj: angla, franca, hispana kaj araba. Mi proponis al la ĝenerala ĉefredaktoro Jakov Lomko (decembro 1917 – januaro 2018) eldonadi ene de la eŭroplingvaj gazetoj E-lingvan rubrikon kaj fondi E-lingvan revuon. La preparado progresis, sed pro subitaj ŝanĝoj en liaj postenoj la afero ĉesis senrezulte, ĉar la anstataŭinta lin Nikolaj Jefimov ne subtenis la ideon kaj rifuzis ankaŭ eldoni E-suplementojn. Sub la redakto de Jefimov la gazeto ekis aperadi ankaŭ rusligve.

Lomko kaj Jefimov kelkfoje proponis al mi esti ĉefredaktoro de la arablinva versio, tamen mi obstine rifuzadis, ĉar tre ne ŝatis gvidi homojn, esti estro. Kariero min tute ne interesis.

En 1983 mi foriris el la redaktejo, ĉar ne volis labori kun la tiutempa redaktoro de la arablingva gazeto, tro orgojla pigrulo. Oni akceptis min en la eldonejon «Raduga», en la redaktejon de fremdlingva literaturo, kun la kondiĉo, ke mi lernu turkan lingvon. Mi eklaboris en la fako de literaturoj de Azio, Afriko

kaj Latina Ameriko, kaj mia tasko estis redakti tradukojn al la rusa el araba, angla, franca, hispana kaj turka lingvoj. La laboro estis tre konvena, mi havis sufiĉan liberan tempon, do tradukis eksterlabore po unu libro el la araba kaj la franca.



**Jegor Vladimiroviĉ
Jakovlev**

En 1986 «Moskvajn Novaĵojn» ekestris Jegor Vladimiroviĉ Jakovlev (1930-2005). Sub lia gvido la gazeto fariĝis tre populara, aperis versioj greka, germana, itala, ankoraŭ iu. Aboni ĝin ruslingve estis afero neebla, ne estis permeso. Ĝi havis eldonkvanton nur 50 mil ekzempleroj, por la tuta lando! Homoj staris en vicoj antaŭ kioskoj po kelkaj horoj, atendis venon de la gazeto.

Jegor Jakovlev invitis min gvidi la arablingvan version. Mi nevole konsentis, ĉar estis serioza aldono al la salajro, necesis ja nutri la familion. Por mi tiu laboro estis tre malagrabla, ĉar la gazeto estis tro populara, do delegitaroj el arabaj landoj volis viziti la redaktejon, kaj mi devis ilin akcepti. Arabaj ambasadoroj petis mian aŭdiencon por preparoli iujn

publikaĵojn, sendadis al mi donacojn en festotagoj – viskion, kafon, cigaredojn. (La viskion kaj kafon mi konsumis plezure, sed ne fumis). Necesis ankaŭ vizitadi oficialajn akceptojn en ambasadejoj el dudeko da arabaj landoj, ankaŭ de iuj afrikaj, kaj ne forgesi pri la gazeto. Nokte de mardo al merkredo mi devis trarigardi la kontrolan ekzempleron kaj subskribi ĝin, permesi la mulobligon. Kelkfoje mi trovadis seriozajn, nepermeseblajn erarojn. Ekzemple, en subtitolo anstataŭ «Centra *Komitato* de komunista partio» estas «Centra *paradizo* de komunista partio». Sed tio estas bagatelo. En alia numero anstataŭ «Komunista *partio* de Soveta Unio» estas (pardonu min geknabinoj, sed tiel estis) «Komunista *peniso* de Soveta Unio». La kaŭzo estis simpla elfalo de unu litero. Kaj se mi tion ne rimarkus, se la gazeto trafus en dudekon de arabaj landoj en dekmiloj da ekzempleroj? Longe mi sidus en prizonoj pro kontraŭsoveta agado...

Mi proponis al Jakovlev eldonadi la gazeton ankaŭ en Esperanto, faris provnumeron en 10 mil ekzempleroj, dissendis ĝin al ĉiuj naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj. La redaktejo ricevis pli ol milon da subtenaj reeĥoj el dekoj da landoj, en Japanio estis farita abono, gvidantoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj promesis aboni 12 mil ekzemplerojn, kun koncernaj instancoj estis pridiskutita la vendoprezo laŭ la ŝtataj tarifoj, sed la afero estis nuligita pro politika miskonkordo inter du decidaj personoj. Kaj tio estis bone, eldonado ne daŭrus longe, ĉar komenciĝis «perestrojko», do ŝanĝoj enlande, baldaŭ oni decidis likvidi fremdlingvajjn eldonaĵojn, komencinte de la arablingva.

Mi perdis laboron. Sed ne gravas. Nelonge antaŭ tio mi ricevis inviton de la privata eldonejo «Zmej Goriniĉ» («Змей Горыныч») tradukadi librojn el la angla. La fondinto-direktoro estis verkisto Jurij Nikitin. Mi tradukis kvar librojn, tamen neniu estis publikigita, ĉar la eldonejo bankrotis – iu rabis ĝiajn havaĵojn. Tamen duonon de la honorario mi ricevis dum la tradukado. Nikitin ne restarigis la eldonejon.

Nelonge daŭris mia ripozo – mi ricevis inviton labori en TASS kun...

franca lingvo. Post kelka tempo estis lanĉita ĉiusemajna almanako «Militteknika kunlaboro». Mi ĝin kompiladis dum kelkaj jaroj. En 2004 mi foriris, ĉar la fakestro foje kondukis malĝentile. En 2008 oni invitis min reveni, kaj mi okupiĝis pri kompilado de alia ĉiusemajna almanako – «Aeronautiko kaj kosmo». Dum mia laboro en TASS la loka gazeto «Тассовеи» dufoje publikigis artikolojn pri mi kiel esperantisto. Mi laboris tie ĝis la aĝo 78-jara, fininte en 2013.

Mi menciis ne ĉion, sed ankaŭ la menciitaj momentoj verŝajne superfluas.

Bedaŭrinde, jam la sesan jaron mi neleĝe loĝas en Belgio, malgraŭ ke neniam havis deziron loĝi ekster Rusio. Tamen ĉi-tie situas ĉiuj kvar miaj familianoj – la filino kaj tri genepoj. Kaj mi apudas.

Belgaj instancoj ne permesis al mi loĝi en Belgio, ne donis lokajn dokumentojn...

Esperanto? Mi faris kelkajn prelegojn en diversaj urboj, vizitadis lokan klubon antaŭ la pandemio. Nenion verkas. Ne ŝatas. Mi preferas fotadon, ĉar ĝi estas senvorta. faris centojn de fotobildoj dum la vivo, tamen ĉio restis en Moskvo, krom kelkaj, kiujn mi ĉi-tie prezentas. La kvalito ne estas bona, sed ili almenaŭ ion rakontas pri la lokoj vizititaj...

Fotoverkoj de Vladimir Samodaj



En urbo Brugge. Belgio






Palmyro (Sirio). 1969/2009





En Arabaj Emirlandoj





A.P.Čeňov
Moskvo







En Arabaj Emirlandoj





En Arabaj Emirlandoj







Jubileaj dediĉoj

Al V. V. Samodaj

Vin gratulu somera ĉielo
Kaj ĝojiga rideto de flor’
Pri l’ naskiĝo sub la verda stelo,
Pri la briljublea humor’!

Vi ĝis nun kvazaŭ ree spritvortas
En etoso de l’ kluba medi’.
Via “Cerbe kaj kore” ne mortas,
Plu venante al Esperanti’.

Por la vivo en verda koloro
Pravas vasta animmalavar’.
Vin pro l’ abnegacia laboro
Ĉiam dankas l; esperantistar’.

Verdaj koroj heligas la mondon,
Ĝin amike vokante al bon’,
Kaj vi donas konvinkan respondon
Pri la lingvo por la vivkompon’.

Dum la vivo obstinas plu premi
Per malsan’, malsukces’, malesper’,
Esperanto vin helpos vivemi,
Vi ĝin helpas plu verki sur ter’.

Klara Ilutoviĉ

Jes, mi ĉiam vias, mia mistera misterEsperanto!

Vladimir Samodaj ludis tre gravan rolon en mia vivo. Mi ne eraras, se mi diros, ke precipe dank' al li mi iĝis vera esperantistino.

Unuan fojon mi konatiĝis kun li en 1975 dum SEJT-17 en la Altaja regiono. Vladimir Vladimiroviĉ gvidis tie la tradukistan kurson, kiun mi partoprenis kiel lernantino. Tio estis por mi tre bona majstro-metiejo. Por ni, komencantaj esperantistoj, tre bonŝancis studi traduk-arton ĉe Samodaj, tre sperta profesia lingvisto, poligloto, tradukisto kaj redaktoro. Li instruis al ni profundan rilaton al la tradukataj tekstoj, donis bazajn sciojn pri diversaj leksikaj kaj stilaj rimedoj de tradukado. Krome, la instruisto ravis min per sia impona



personeco. Temas ne nur pri lia aŭtoritato de la elstara tutmondskala esperantisto, sed ankaŭ pri lia sprita saĝo, subtila humursento, atentemo al ni, novicoj. Vladimiro ŝatis perpleksadi per siaj humuraj demandoj, ligitaj kun la lingva ludado. Foje li proponis al mi tian taskon: “Bonvolu tuje traduki el Esperanto al la rusa lingvo la vortojn “ovino” kaj “ovido”, kaj ridis pro mia



V. Samodaj kaj L. Novikova - atestantoj de geedziĝo de A. Gonĉarov kaj I. Valina

konsternita mieno.

En la tutsovetiaj Esperanto-tendaroj estis tradicio pri elekto de Mister kaj Miss Esperanto inter la plej aktivaj partoprenantoj. Imagu miajn miron kaj jubilon, kiam oni anoncis fine de la tendara periodo min kaj Vladimiron Samodaj

kiel la elektitojn por tiuj honoraj titoloj! Tiu fakto, kiel mi nun bone komprenas, spirite ligis min por ĉiam kaj kun Esperanto, kaj kun mia glora Mister Esperanto.

Poste mi dum la tuta vivo ege estimis kaj adoris lin. Li por mi ĉiam estis kaj restas ĝis nun neatingebla stelo en la Esperanto-ĉielo. Lia opinio pri mi, miaj agoj kaj kreaĵoj estis por mi tre gravaj. Post mia translokiĝo en Moskvon en 1979 Samodaj partoprenigis min en la literatura kaj eldonada agado, gvidata de li, kiel aŭtoron kaj tradukiston de literaturaĵoj. Li estis redaktoro de la Esperanto-suplemento de la ĵurnalo “Moskvaj novaĵoj”, poste dum multaj jaroj eldonadis komence literaturan gazeton “Cerbe kaj kore” de la Moskva Esperanto-klubo “Leo Tolstoj”, poste la revuon “Scienco kaj kulturo” de la universitato “Justo”.



Konatiĝo kun la historio de vivo kaj Esperanto-agado de Samodaj, priskribita far li en la memoraĵoj, eldonitaj de “Impeto”, ebligis por mi kompreni la tutan skalon de lia personeco. Li estas la homo-epoko, en kies sorto reflektiĝis kaj tre komplika, ofte tragika historio de nia lando, kaj drameca vivo de la sovetiaj esperantistoj. Bedaŭrinde la sorto disigis nin nun, la ŝtataj limoj apartigis nin unu disde la alia. Sed restas elektronika ligo kaj, ĉefe, interligo anima. Kiel ĉiam, Samodaj komencas siajn mesaĝojn al mi per la ŝerca vortludaĵo “Ĉu vi mias mia Miss el Miass?”. Kaj mi tradicie respondas al li: “Jes, mia ĉiam vias, mia mistera Mister!”

Ludmila Novikova

Ho, Vladimiro, Via Moŝt’ Mister-a,
De tuta mia vivo hom’ mistera!
Forlogis vin la fremda land’ mis-tera,
Sen Mister restis la duon’ Miss-era!
Jen estas la gratul-mesaĝo
Por via (nekredeble ja!) mir-aĝo!
Ĉu baldaŭ estos sama la Miss-aĝo?
Ĉu niaj junaj jaroj nun miraĝo?
Sed niaj koroj restu sen despero,
Ĉar lumas same l’ lingvo de Espero!
Dum tuta nia vivo ĝi es pero
Inter mi, Miss, kaj vi, Mister’o!

Via Miss el Miass

**Dediĉoj al V. Samodaj diversjaraj de
*Mikaelo Bronŝtejn***

**Interparolo de la malnovaj amikoj
(kunaŭtoras Don Memfor)**



BŜ: Sinjoro Memfordon'!

DM: Sinjoro Bruna Ŝton'!

BŜ: Sinjoro Memfordon',
tremanta mia memo
esperas pri l' pardon'
por fia forgesemo.
Kun ostoj, do, – ho ve! –
rutino min englutis;
por via jubile'
mi vin eĉ ne salutis...

DM: Sinjoro Bruna Ŝton'!
Plej nobla via memo
ne petu pri l' pardon'
por via “forgesemo”.
La jubilee-salut'
ne estas devo via,

sed ravis min ĝis mut'
gratula dir' genia.

BŜ: Amiko Mempoet'!
Ne lasu vin kuraĝo.
Mansvingu kun ridet'
al via bela aĜo.

DM: Sincere diras mi:
Neglektas mi la aĝon,
sed ekde ĉi-juni'
mi havas avantaĝon,
ĉar uzas sen problem'
la urbajn trafikilojn
kaj gardas por mi mem
de rubloj multajn milojn.

BŜ: Ĉu deca nobla griz',
babilo saĝe loga
maltaŭgos por striptiz'
de junulin' mensoga?

DM: Mi malgraŭ kapa griz'
en in' plezuron vidas,
sed inoj por striptiz'
al mi jam ne rapidas.
Malsaĝaj! Ili min
ignoras tute vane –
mi pretas kun junin'
batali... surdivane!

BŜ: Ĉu rustas la skribil'?
Ĉu magras la linioj?
Ĉu lasas en trankvil'
trompaĉoj, kalumnioj?
Antaŭ respondi "ne"
meditu heziteme:
Ne fartas eĈtine'
en ŝranko senprobleme.

DM: Ĉu la skribilo? Nun
jam pinto ĝia rustas,
malpli ol en la jun'
verkad' al mi bongustas.
Problemoj? Ili min
atakas kun persisto,
sed mi ĝis ĉerka fin'
ne cedos sen rezisto.

BŜ: Karulo Membonkor'!

Prosperu, sanu, satu!
En ruĝlumtura for'
kalvaĵon foje gratu –
rimvortojn por poem'
eltrovu laŭbezone,
kaj, certe, estu mem
pli riĉa ankaŭ mone.

DM: Amiko Ŝtona bard'!
Mi dankas vin kun varmo
por la gratula ard',
por bondezira svarmo.
Kaj la kalvaĵon, jes,
ni reciproke gratu
kaj dum poem – proces'
la rimojn intergvatu.

BŜ: Revante paŝu plu,
kaj por la ventoj ontaj
nin portu tempoflu'
al kantoj kaj renkontoj!

DM: Vi same, Bruna Ŝton',
prosperu, inojn ravu
kaj por la viva bon'
sufiĉan monon havu!

1997

Por la jubileo de V.V.S.

Riveroj emas flui nur al maro,
ĉielen fumoj, teren – blankaj neĝoj,
al dancoj impetegas junularo,
sed ni? – Nu certe al komfortaj seĝoj

por diskutad' nehasta kaj tentiga,
por vodkumad' agrabla kaj sufiĉa...
Apenaŭ floro dum ekzil' entiga
komplete povas senti sin feliĉa.

Niaj renkontoj kurtas kaj ne oftas,
do mankas tempo por sidad' ĉe brandoj.
Sen diskutado pensoj miaj orfas,
la kapo jam ŝveladas pro demandoj.

Do mi demandu vin, amiko kara,
Ĉu plu ĝojigus vin ĉebranda sido?
Ĉu ne tro pezas premo sepdekjara?
Ĉu tente logas la fraŭlina rido

por amindum', almenaŭ por fotado?
Ĉu la okup' Sciencakaj-Kultura
restadas daŭre la ŝatata pado
por vi, la Membr' Honora kaj ho – nura



en vasto postsoveta kaj rusia?
Ĉu stultajn leĝojn vi akceptas pace?
Ĉu venas foje verso emocia?
Ĉu plu bonigas homojn vi kurace?

Se respondados vi per jesa gaj',
do restas vi plej sama Samodaj',
kaj mi deziras kun sincer' aklama,
ke vi ĝis centjariĝo restu sama.

aprilo 2005

Por V.V.S.

Vivo vira estas vivo martira –
Vi konsentu, kara, aŭ malkonsentu,
Sed postulas nia aĝ' suprenira,
Ke ni iron de amikoj kunsentu.
Evidente, la procezo stabilas:
Jubileas vi, do mi jubilas.



En la vivo ni apudas malofte –
des pli kara estas ĉiu renkonto,
kaj nevole atendatas bontrov' de
alparolo por sincera rakonto.
Do fridujen metu vodkon, haringojn
por agordi kaj humorojn kaj lingvojn.

Trankviligu vin okupo poeta,
produktanta purajn rimojn kaj sentojn,
kiel sido apud akvo kvieta
trankviligas enanimajn turmentojn.
Ne rapidu trankviliĝi enorme,
sed ripozon havu foje. Endorme.

jun. 2005

AI VVS

Aĥ, mia kara Samodaj,
la senkompara Samodaj!
Dum kvindek jaroj vi diboĉas
sub nia verda stelo, kaj
rezulte de la diboĉad', –
amiko, kamarado, frat', –
al la estonto poezia
tre multajn gvidis via pad'.

Memoras vin en cima rol'
nur grizkapuloj, sed parol'
pri l' SEJM-akuŝaj aventuroj
cirkulas plu en la popol'.
Ho, sveltis vi, kiel fraksen',
sed iom malsolide sen
aŭtoritato elstaranta,
antaŭen kvazaŭ mol-kusen'.

Do dum vagado en la mond',
trans nia verda horizont',
fidinde planis kaj prizorgis
vi ĉion ĉi por la estont',
Kaj, reveninte por eksku'
de l' uloj en "Anba Mosku",
per esperantaj suplementoj
aperis en legaĵ-vaku'.

Verŝajne, dum prezida dorm'
vin kaptis poezi-ador',
kaj eleganta poemaro
naskiĝis tuj en via kor'.
Poet' samkiel malpoet'



en via moskva ekgazet'
azilon trovis kontraŭ spleno
dum la tutlanda kvodlibet'.

Sed nun scienco kaj kultur'
rideton vian portas sur
la kovrilpaĝoj, kaj lipharoj,
kontente pretas al murmur'.
Kaj kun spirita arda ben',
navigas lerte vi, balen',
tra l' ocean' de l' verda vivo –
foje kun mono, foje – sen.

Do, mia kara Samodaj,
neniam knara Samodaj,
plu vivu vi en deca farto,
kaj estu sana sen malgaj'.
Sed mi en ĉirkaŭanta hor',
dankegu la destinon por
la amikeco, donacita
al reciproka bonhumor'.

14.04.08

Al VVS

Mi ĝojas, kara Samodajo,
ke, laŭ fidinda opini',
post via sepdek kvara majoj
la sepdek kvina jam juni'
vin tuŝas en la glora hasto
per laŭra kron' de l' jubile'.
Eksonas drasto kaj bombasto
en la gratuloj re kaj re.

Kaj mi aliĝu kun plezuro
al la bondeziranta hor',
kie scienco kaj kulturo
fandiĝas en gratulfervor'.
Estante ja samideano
ekde la adoleska flam',
mi sentas min samodajano,
fidela ano de l' team'.

Do nun, levante glason ame
je viaj ĉarmaj sepdek kvin,
post dudek kvin mi revas same
gratule alparoli vin.

17.06.10




Samodaj

Vasto ventra, ruz' prudenta
en atenta okulpar'.

Emo troti, inojn foti,
sed dormemo venkas, ĉar –
vasto ventra, ruz' prudenta
en atenta okulpar'.

(El "Krokizoj" -2008)

AI VVS



Vladim Vladimiĉ Samodaj,
ĉu vi enuas en Belgio?
Ĉu ne forgesis malgraŭ ĉio
kaŭzetojn por komuna gaj'?

Jen estas unu: la juni'
alportis vian jubileon.
Do ekjubilu kune ni,
kaj kune verŝu gaj-oleon
en fajron de l' daŭranta viv'
por ke ĝi brulu senriproĉe,
por ke la juno, la kreiv'
encerbe restu kaj envoĉe,
por ke la vila amikec'
neniam venu al kalviĝo,
por ajna plag' de ajna spec'
ne baru vojon al feliĉo.

En mia netrobonhumor'
min ja varmigas la konscio,
ke plu funkcias via kor',
ne elĉerpiĝas la fervor'
kaj ne perfidas la memor' –
mi kore dankas vin por tio!

Nur okdek jaroj – infanaĝ'!
Do bondeziru mi laŭjude,
ke vi aspiru kun kuraĝ'
almenaŭ l' aĝon de cent dudek.
Kaj gaje glason tuŝu glas',
tostante je l' fortuna dono,
kaj ripetiĝu la okaz'
dum multaj jaroj.

Bruna Ŝtono

17.06.2015

Cerbe kaj kore – ido de Vladimir Samodaj


Fine de 1980-aj jaroj V.V.Samodaj organizis en Moskva E-klubo literaturan rondeton (helpis al li ankaŭ L.Novikova). Tio vere multon donis al mi, kaj probable same al aliaj rondetanoj.

En majo 1990 aperis la unua numero de “Cerbe kaj Kore” – la bulteno iĝis ĉiumonata organo de Moskva Literatura E-klubo. Niaj verkemuloj prezentis proprajn verkojn, kaj legis verkojn de nialandaj korifeoj (K.Gusev, S.Rublov k.a.). Ĉio ĉi kontribuis al formiĝo de Moskva Literatura skolo, do post ioma tempo eldoniĝis poemaroj “Moskvaro” (1998) kaj “Moskvaj sonoriloj” (2007).

Samodaj neniam trudis sian opinion. Li eĉ ĉiam nomis sin ne “redaktoro” de CkK, sed nur “modesta tajpanto”. (Samkiel Zamenhof ne nomis sin “aŭtoro de Esperanto”, sed nur “iniciatinto”...) En 1990-92 aperis 22 kajeroj de “Cerbe kaj Kore”, sekvis eta paŭzo, dum kiu la apartan bultenon anstataŭis samtitola rubriko en “Moskva gazeto” (redaktoro M.Bronŝtejn). En 1995 “Moskva gazeto” ĉesis aperadi, kaj tuj ekis la dua eldonperiodo de “Cerbe kaj Kore”, en 1995-97 aperis pliaj 28 kajeroj. Finiĝis la dua eldonperiodo.

En 1998 Oĉjo Dadaev (kie li estas nun? kiu lin memoras?) havis napoleonajn planojn. Li fondis informbultenon “Artefakto” kaj revis, ke ĝi havos

dekon da diverstemaj suplementoj. Feliĉe, li proponis redakti la literaturan suplementon al mi. Nature mi tuj pensis pri jam konata kaj aŭtoritata titolo “Cerbe kaj Kore”. Mi petis permeson de s-ro Samodaj uzi la titolon, kaj li afable permesis. Do en 1998-2000 aperis pliaj 18 numeroj. Poste al mi tedis neakurateco de Oĉjo – preta kajero iam kuŝis dum 2-3 monatoj atendante multobligon, do en 2000 finiĝis la tria eldonperiodo de “Cerbe kaj Kore”. Nature velkis ankaŭ “Artefakto”, kaj ĝiaj multnombraj suplementoj eĉ neniam aperis (krom la filozofia “Libera penso”, unusola numero same redaktita de mi – mi simple bezonis iel aperigi mian artikolon).



Kaj ekde januaro 2018 “Cerbe kaj Kore” reaperis en la nuna formo, redaktata de Nikolao Gudskov. La malnovaj tradicioj, fonditaj de V.V.Samodaj, plu vivas...

Valentin Melnikov

Poezio

Kanto de Mikaelo Povorin laŭ poemo de Vladimir Samodaj




Kio estas poezio?
Mi ne scias, kedu min.
Ĉu ĝi estas fantazio
Aŭ enigmo sen difin'?

Ĉu kaŝludo intelekta,
Senelira labirint'?

Aŭ ĉu eble pado rekta
Al plej alta arta pint'?

Ĉu ĝi estas klara penso
Atingebla por kompren'
De la hom' kun simpla menso
Nekapabla por diven'?



Ĉu ĝi estas art' superba
Ŝirmi sencon de la vort',
Por poeta histo cerba
Estas nura lingva sport'?

Ĉu ĝi estas elokvento
De l' racia harmoni',
Aŭ kriado kontraŭ vento
Pro kaprico de l' mani'?

Estas multaj opinioj,
Tamen mankas determin',
Do stultuloj kaj genioj
Ĝin diskutas kun obstin'.

Mi ne scias. Mi ne volas
Min turmenti pri la tem'.
Mi modeste tute rolas
En la solvo de l' problem'.

Miaj versoj ne hipnotas
Per bombaste pompa rim'.
Mi nur simplajn vortojn notas,
Kiujn diktas la anim'.

1994

La kanto aŭskulteblas en la reto laŭ la adreso


<https://www.youtube.com/watch?v=wPIGM9-KuoQ>

Originala poezio

Nikolao Neĉajev (Irkutsko)

Fluo

Likis mia brusto iam,
Koren fluis pluvo, ros' .
Tiun fluon melodian
Mi deklamas kun patos' .



Optimismo

Mono mankas, mi malsatas
Sed min mondo ne kompatas:
Suno ridas, kato ludas.
Kaj pro tio mi konkludas:
Mi ne devas malesperi,
Devas ĝoji sur ĉi ter' .

Maljunulo


Pro malsano l' korpo febras
Sed l' animo plu eĉebas.
Junas most' en praa tas' .
Iam sentas li doloron
Tamen vekas lian koron
Freŝa vent' el vazistas' .

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo)

Ni atendu

La kronviruso
Laciĝos de si,
Kaj en ĝia fluso
Foriros pasi' .

La klub' refunkcios
Por esperantist' ,
Humporoj plu scios
Viglecon sen trist' .



Kunvenos amikoj,
Serenos vizaĝ',
Malgravos implikoj,
Vekiĝos kuraĝ'.

Kaj sen kvarantenoj,
Sen premo de tim' –
Jam sen ajnaj senoj
Liberos anim'.

Ho, kia do festo
Ekkantos en kor'
Je gaja tempest:
L' virus iris for!

Al 180-jariĝo post naskiĝo de P. I. Ĉajkovskij

Riveras la viv' al la koro suspire
En sonoj de l' kara muzik'.
Jen io etgrava ekbrilos altire?
Jen kvazaŭ konsolas amik'.

Forpasas blindec' dank' al volo kaj kredo,
Amfajron estingas monfort.
Je lumo de la simfonia heredo
Pleniĝas la hom' kaj la sort'.

En famaj koncerto, baletto, opero
Plu vivas favora aŭgur',
Kaj en Jarsezonoj kortuŝas tenero
De l' milda subtila natur'.

Vastegas la viv' en sincera brakumo
De ravo en la melodi'.
Per la simpla ĝoj' "Porinfana albumo"
Karesas por gracsugesti'.

Kaj en la romanoj magie sonoras
Por ĉiu kaj ĉiuj en am'.
Venkante animojn, ĝi velkas aŭ floras
En vivaj feliĉo aŭ dram'.

Timiga espero, terur' de mistiko,
Ofendo, pasio kaj trist' –
Belego de sentoj en granda muziko
De l' granda Ĉajkovskij – l' Artist.



Звёзды над Россией
Людмила Олифирова

*Посвящается солдатам,
погибшим весной 1945 года*

Видит земля еще зимние сны,
Но уже в воздухе запах весны,
И над Москвой журавли пролетели.
Хочется сердцу добра и тепла,
Хочется, чтобы любовь позвала,
Ах, как нам хочется счастья в
апреле!

Припев:

Россия, Россия,
Звенит ручейком твоё звонкое имя,
Россия, Россия,
Нам кажутся звезды очами твоими.

Помнишь берёзовый светлый
лесок?

Вот бы туда заглянуть на часок,
Нам до победы осталось немного.
Хватит войне на земле полахать,
Мир уже близко – рукою подать,
Нам бы дойти до родного порога!

Припев:

Память о тех сохранить мы
должны,
Кто не увидел победной весны,
В серых шинелях навеки остался.
Помните тех, кто страну защищал,
Жизнь за родных и любимых отдал,
Кто не предал, не сломался, не
сдался!

Muziko de Ludmila Olifirova

Steloj super Rusio
Ludmila Olifirova

*Omaĝe al la soldatoj, pereintaj
en printempo 1945*

En vintra somno¹ vegetas la ter',
Sed je printempo odoras aer',
Kaj super Moskvo – gruara flotilo².
Koro aspiras la bonon de varm',
Koro aspiras la vokon de am'.
Aĥ, revas ni pri feliĉ' en aprilo!

Refreno:

Rusio, Rusio,
Belsonas purfonte nom' via en ĉio,
Rusio, Rusio,
Jen viaj okuloj en konstelacio.

Ĉu vi memoras betulojn kun sun'?
Se povus ni tien kuri jam nun!
Restis ĝis nia finvenko et-ono.
Ne plu flagradu milit' sur la ter',
Paco proksimas – kaj ĉesos sufer',
Kaj ni revenos al hejma perono!

Rf.

Tiujn memoru ni dum tuta temp',
Kiuj pereis por venka printemp',
Restis por ĉiam en griz-militjako.
Gardu memoron pri ĉiu soldat',
Kiu batalis por la patroland',
Kiu herois en morta atako!

Trad. de Ludmila Novikova (2020)


¹ somno – dormo, sonĝo (Henry Vatré. Neologisma Glosaro. – Saarbrücken, 1997, p.47)

² flotilo – militŝipareto (Henry Vatré. Neologisma Glosaro. – Saarbrücken, 1997, p.23)

El la kronvirusaj noveletoj *Mikaelo Bronŝtejn*

Jes, sinjorino, mi konsentas. Tiu kvaranteno sencerbigas. Se oni umu ĉe TV-kestaĉo.

Sed – kuraĝu iom promeni! Ne, la urbo ne taŭgas. En kamparo. Tie, certe, forestas virusoj. Sed estas urtikoj, mi ege ŝatas junajn majajn urtikojn, ĉu vi?



Jes, ili pikas, sed mi kunportas gantojn por rikolti. Ho ne, ne por salato. Por verda urtika supo. Kun viando, certe. Ankaŭ ovon oni metas en teleron, gusto – perfektega!

Do, antaŭhieraŭ mi promenis en kamparo. Post ĵusa pluveto la aero estis emociiga, kiel konjako, eĉ pli! Bedaŭrinde, miaj botoj glitetis sur pado, kaj mi falis genuen, kotiginte la pantalonon. Ne gravas, dum la falo mi rimarkis en proksimo arbustetojn urtikajn, incite verdajn.

Mi surmetis la gantojn kaj ekrikoltis la freŝajn tigojn, metante ilin en plastan saketon. De malproksime laŭ la pado renkonten al mi malrapide paŝetis oldulino. Alirinte ŝi haltis kaj scivoleme-mire rigardis min.

– Urtiko!? – demandkrietis la avinjo. – Por kio vi bezonas ĝin?

– Por puni miajn infanojn... – mi ridetis. – Tamen, certe, ne por tio. Mi kuiras supon.

– Suuupon! – la avinjo globigis la okulojn, kaj suspekteme strabis al mia kotmakulita pantalono. – Ĉu vi havas nenion por manĝi?!

– Mi havas, – denove mi mienigis afablan rideton. – Sed mi ŝatas urtikan supon.

– Aha-a – etendis la voĉon la avinjo, kaj denove jetis rigardon al mia pantalono. –Je-es, en la kvardek dua dum la blokado ankaŭ mi kun panjo rikoltadis urtikojn por supo.

– Nun estas preskaŭ simila tempo, – diris mi kun severa rikano. – Pandemio. Homoj perdas laboron. Mankas mono.

– Jes-jes! – eksklamaciis la avinjo. – Rikoltu, mi ne malhelpos!

Ŝi firme premis sian saketon al la busto, singarde strabante preteriris min kaj haste ektrotetis for laŭ la kampa pado.

04.05.2020

Mia apartamento situas en la kvina etaĝo. Ili aperis en apartamento super la mia antaŭ du semajnoj – miaj novaj bruemaj najbaroj. Ekde la dudek dua horo kaj preskaŭ ĝis la noktomezo iu prancas, saltadas, galopas super mia dormoĉambro. Terura afero, se oni ŝatus endormiĝi!

Neniam ĝis hodiaŭ mi vidis la najbarojn. Pro la kvaranteno ĉiuj restadas hejme, kaj neoftaj elhejmiĝoj, versimile, neniam kongruas. Samkaŭze mi ne vizitas la najbarojn por plendi pri troa bruemo, revante pri negranda malstreĉiga skandaleto post fino de la kvaranteno.

Hodiaŭ, elirinte, mi aŭdas supre nekonatajn voĉojn – la novaj najbaroj eniras lifton por descendi. Mi haste kuras laŭ la ŝtuparo al la unua etaĝo por kapti ilin ĉe la elliftiĝo.

La pordo de la lifto disiĝas kaj eksteren saltetas sinsekve du ĉarmaj etulinoj, tri kaj kvin jarojn aĝaj, laŭaspekte. Ilin sekvas la patrino, poste la patro.

– Bonan matenon, – mi diras. – Mi estas via najbaro, mi loĝas sub vi...

Dum mi estas serĉanta vortojn taŭgajn por la situacio, la gepatroj afable respondas salute, sed la plijuna, kaj evidente pli kuraĝa knabino elparolas rapide:

– Saluton, avoĉjo, kia estas via nom’?!

– Avo Miĉjo... – mi respondas, pro embaraso forgesante la vortojn, kiujn mi trovis en la kapo.

– Avo Miĉjo! – ripetas la infano. – Avo Miĉjo, vidu, kiajn ŝuetojn mi havas! Ĉu vere estas belaj?

– Bele-egaj... – respondas mi iom stumble, perdinte la lastan guton de la akumulita kolero. – Ni konatiĝu, ĉu?

08.05.2020

La kronviroza majo. Du aŭtoj parkas sin apud ĉiovendejo. El nigra Tojoto pene metas teren luksajn ŝuojn obeza rufulino. Ŝian vizaĝon ŝirmas altpreza longuza masko. Vizonpelta mantelo, vestita, verŝajne, nur por montri la socian staton, estas malbutonumita – dek ok gradoj super nulo ja...

Longakrura pli juna magrulino en ŝika leda jako kaj kun simila longuza masko, forlasinta la najbaran aŭton, alparolas la obezulinon:

– Natalia Sergejevna, bontagon! Kiasorte vi venis ĉi tien?

– Bonan, Alina... – respondas la obeza lacvoĉe. – La nepo ian roboteton petas, mi ne tre komprenas, jam kelkajn butikojn ni traserĉis... Jelisej, ne elauĵtiĝu sen masko! – krias ŝi al blonda knabeto kun akvopistolo.

Tiumomente al la paro proksimiĝas pene oldulino, mizere vestita kun bastono en unu mano kaj kun plasta saketo en la alia.

– Damoj, – ŝia voĉo tremetas. – Mi estas emerita instruistino, mi hontas, ke mi devas nun... Sed ĉu vi povus aĉeti por mi iom da pano? Nur la panon...

– Kial polico ne deĵoras ĉi tie? – grumbblas la obezulino. – Mi pagas ĉie per karto, do ne havas monbiletojn por almozdoni.

La knabeto Jelisej, elauĵtiĝinta en masko, ridas kaj ŝprucas akvon kontraŭ la oldulino. Tiu turnas sin kaj silente foriras.

– Ho jes, mi komprenas vin, Natalja Sergejevna! – emociplene intervenas la longakrura. – Ankaŭ mi serĉadas tra la tuta urbo – nenie eblas akiri Mozarella, nur plebaj fromaĝoj kuŝas. Kia vivo!
11.05.2020

Bedaŭrinde, en la grandurbo nun ĉiuj devas surmeti maskojn. Jes, bedaŭrinde, ĉar mi ne vidas ŝian vizaĝon, kvankam mi ŝatus. Ŝi staras ĉe la fenestro en tramo tri metrojn for de mi. Fascina staturo, bunta rufa hararo; verŝajne, ne pli ol 20 havas la ĉarmulino. Krom ŝi kaj mi en la grincanta, ŝanceliĝanta vagono sidas ĉirkaŭ dek disciplinemaj oldulinoj, kompreneble, ĉiuj – maskitaj.

La fraŭlino prenas el mansaketo poŝtelefonon.

– Manjo! – ŝia voĉo estas senhonte laŭta sed agrabla. – Vi ne imagas, Manjo! Mi havas postaĵon! Teruran postaĵon!

La oldulinoj videble streĉas la orelojn kaj scivoleme gapas al la rufulino. Indulgu min, sed ja ankaŭ mi direktas la okulojn al la menciata objekto. Nu? Nenio terura rimarkeblas, tre bela postaĵeto pakita en malloza ĵinso... Cetere, ŝi absolute neglektas la scivolemajn rigardojn.

– Jes, Manjo, vi ne povas tion imagi! – ŝi daŭrigas. – Tia postaĵo! Hieraaŭ mi havis en Zoom ekzamenon pri matematiko! Mi malsukcesis, Manjo! Tiu olda furzulo, la profesoro – li estas senkompata! Mi eĉ ne scias, kion fari nun – tia postaĵo!!!

– Studentino kompatinda... – inteligentaspekta oldulino diras al la najbarino. – Fiaskis dum ekzameno, do ne ricevos stipendion. Tia postaĵo...
13.05.2020

Jes, mi drinketas. Tamen ne ĝis tia grado, ke al mi aperu kvarokulaj verdaĉuloj. Cetere, kiam ĝi (li aŭ ŝi?) aperis en mia bunkro, mi estis absolute sobra, kredis min!

Jes, kvar okuloj – tiel ĝi observas ĉiujn flankojn samtempe. Sed al mi ŝajnis, ke ĉiuj kvar okuloj estas direktitaj al mi!

Ĝi diris solene-knarvoĉe: “Ne timu! Vi estas la gvidanto de la plej granda lando. Al vi ni povas konfidi nian donacon por la teranoj!”

Mi silentis embarasite, sed ĝi daŭrigis: “La kronviruson, kiu lezas nun la Teron, ni spertis antaŭ multaj jarcentoj, kaj ni havas perfektan vakcinon kontraŭ ĝi. Jen estas la formulo. Kaj aldone jen – kesto da provekzempleroj, cent mil dozoj, la unua – speciale por vi”.

Tiam mi respondis: “Do, unue, kiel vi sukcesis penetri ĉi-tien preter la gardistoj? Ili devus kapti vin, eĉ se vi estas fantomo. Ĉiujn mi maldungos. Due, vi estas ege suspektinda kun viaj kvar okuloj, eĉ se marsano...”

“Ĉio ĉi ne gravas, – ĝi diris. – Unu el viaj heroaj antaŭuloj montris ekzemplon por la tuta popolo, protektinte sin kontraŭ variolo. Ĉu vi ne volas esti la dua heroo?”

“Mi jam estas heroo. – mi respondis. – Sed mi sufloru al vi, ke la plej granda lando sidas pli oriente kaj sude. Forbalaiĝu tien kun via donaco.”

Ĝi silente palpebrumis per ĉiuj okuloj kaj malaperis. Nun mi sidas kaj skrapas la nukon... Ĉu estis songo, aŭ mi vane rifuzis? Eble mi tamen telefonu al la amiko Si?

20.05.2020

Tedis min la trimonata izolo! Do – enaŭtiĝo, kaj post tri horoj mi jam alpremas al la koro mian nepinon kvinjaran.

– Avoĉjo, – diras ŝi. – Hodiaŭ mi nepre dormos kun vi. Mi jam scipovas.

– Kion vi scipovas, kara? – mi demandas konsternite.

– Dormi trankvile, ne pisi nokte, nu – ne malhelpi vin dormi.

– Bona atingo, tamen, ne, – mi diras. – Via liteto estas pli komforta. Sed vi rajtas legi ion al mi antaŭ la enlitiĝo.

– Mi legos fabelon. Mi jam bone legas, sed skribas malbone. Mi volas skribi bone.

– Pro kio tiu ĉarma deziro? – mi ridetas.

– Avo-oĉjo! – ŝi rigardas min ofendite. – Ja mi diris al vi, ke mi volas esti vendisto de glaciaĵo. Kaj se mi deziros mem gustumi mian glaciaĵon, mi devas ja skribi belan anoncon: “La butiko estas fermata por unu horo”.

Dum mi gapas, pripensante la respondon, ŝi daŭrigas la paroladon:

– Tamen, avoĉjo, mi tute forgesis, kiel mi naskiĝis. Mi volas denove fariĝi eta, por rememori!

Eĥ! Sekvafoje mi nepre venos al ŝi kun sonregistrilo...

04.06.2020



Partneroj

Artjom Belov³

– Ni proksimiĝas al planedo! – aŭdiĝis mia voĉo el laŭtparoliloj.

Kosmoŝipo tremetis, kaj lampetoj sur stirpanelo maltrankvile blinkis, lumigante stirejon per ruĝeta lumo. Stabiligiloj provis venki la atmosferan reziston.

– Estas surteriĝo!

La kosmoŝipo refoje forte skuiĝis, aŭdiĝis frapado, grincado... Kaj ĉio mallautiĝis. Nur pepado de aparatoj rompis silenton. Malrapide elspirinte, mi forviŝis ŝviton de la frunto kaj prenis sendricevilon:

– Dora! Dora, ĉu ĉio estas bona?

Al mi respondis virina voĉo, distordita de perturboj.

– Ĉio estas en ordo! Ĉi-foje ni almenaŭ nenion rompis.

Mi kontente fajfoŝmacis kaj metis la sendricevilon ien malapuden. Duona tasko estas farita – ni venis al Cirkonio, nun necesas preni ĉiujn bezonatajn specimenojn, kaj ni povas kun trankvila animo senprokraste foriĝi de ĉi tie. Havante gajan humoron, mi komencis verki ordinaran mesaĝon por la Centro de Flugado: “Surteriĝo estas sukcesa, difektoj mankas, ni estas pretaj eliri el la kosmoŝipo”. Palpserĉinte en poŝo de jako, mi elprenis malnovan trivitan moneron en la lumon de aparatoj – mian feliĉan talismanon.

– Dankon, kara amiko! – de fera malgranda disko rigardis min grava postenulo kun sennombraj mentonoj. Eĉ Saturno ne povas fanfaroni pri tiom multa kvanto de ringoj.

Sur la stirpanelo eklumis verda lumeto, kaj el la ricevilo aŭdiĝis: “Ni permesas eliron”. Mi rektigis min kun krako kaj, eksaltinte el fotelo, komencis surmeti la skafandron. Ju pli rapide mi finos la aferon, des pli rapide ni flugos hejmen. Helmo, kun ŝuŝado, kuple fiksiĝis en sia loko, kaj sur konvekso vitro antaŭ la okuloj aperis ekrano de operatoro. La laŭtparolilo en la orelo viviĝis kaj murmuris per la voĉo de Dora:

– Kiel ordinare, Gastono. Prenu specimenojn de aero, grundo kaj gaso, kiu interesas la estraron, kaj tuj revenu en la kosmoŝipon. La robotojn “Alfa” kaj “Beta” mi sendos post vi. Prenu instrumentojn por havigi grundspecimenon, kaj ili alportos analizilojn.

– Bone, Dora.

La grava ĝentlemano sur la monero estis metita en malgrandan surbrustan



³

Artjom Belov (naskiĝis en 1992) – rusa verkisto el la urbo Ivanovo, kiu verkis kelkajn librojn en la ĝenroj fantasto kaj scienca fantazio.

“poŝon” de la skafandro. Sible la aero eliris el kluzo, kaj mi lasis unuan piedspuron de homo sur Cirkonio. Mi vidis multajn planedojn dum mia vivo, mi laboris en diversaj lokoj de la galaksio, sed ĉiufoje mi emociiĝis kvazaŭ mi farus tion por la unua fojo. Aliplanedaj pejzaĝoj ĉiam mirigis mian imagon, batigis la koron antaŭĝue de aventuroj. La grundo sub mi estis kovrita de maldika tavolo de purpura polvo – se vi forviŝos ĝin per ganto, vi vidos dikan glacian ŝildon, kiu strange alternis inter tavoloj de petro. Mi faris tion, post unu minuto, ĉe la kosmoŝipo. Kontente mi frapis la glacian kruston per fingro, taksante ĝin kiel sperta juvelisto.

– Kial vi klinis vin tie, Gastono, urĝiĝu!

– Jam iras mi, iras. Lasu min ĉirkaŭrigardi... – mia murmurado iĝis simila al nekomprenebla flustro.

Ni estas senditaj ĉi tien ne por ordinara tasko fari analizon de aero kaj grundo. Certe, ankaŭ tio estas parto de nepra programo, sed la senco de alveno sur Cirkonion estis en tio, ke mi devis preni la specimenojn de neordinara gaso, spektron de kiu scienculoj malkovris per aparatoj de sur Tero. Juĝante laŭ la analizoj, ĉi tiun ŝtonan globeton trais reto de kavernoj, plenigitaj de gaso, kiu ege interesis niajn scienculojn. Mi ne sciis, pro kio la gaso estas neordinara, al mi estis indeferente – laboro estas laboro, kaj por mi tio signifas “alflugu-prenu-forflugu”. Ĝenerale, mi ne devas fari ion neordinaran. Plej malsimpla estas normale surterigi la kosmoŝipon, sed ne kiel ordinare. Mi ne scias, kial oni min ankoraŭ ĝis nun ne maldungis pro tia “stirado”.

La robotoj “Alfa” kaj “Beta” faris ĉefan parton de esplora laboro – ili prenis la specimenojn de aero, analizis ilin kaj sendis informojn por prilaboro. Ankaŭ esplori novan gason devis ili, kaj mi paŝis, fajfante kaj svingante tenajlon por preno de la petro. La robotoj, verŝajne, jam forlasis hangarojn. Baldaŭ Dora irigos ilin. Mi kaj Dora estis Partneroj dum multaj jaroj kaj komprenis unu alian duonvorte. Mi eĉ timas imagi al mi, kiel mi tedis ŝin!.. Ŝi certe nun rigardis kiel mi malstreĉe iras kaj forte insultas min.

Ĉio ĉirkaŭe estis kovrita de purpuraj gruzoj, kaj ial en mia senzorga kapo, tiu ĉi koloro asociiĝis kun brilajoj por Kristnaska festo. Mi svinge piedpuŝis amaseton de polvo, kiu ekpendis en la maldensa aero kiel fajreranta vualo.

– Gastono!

– Tio estas nur polvo, Dora!

– Ĉu vi forgesis la regulojn de sekureco? Ĉu eble, sendi vin ripeti la kurson? Mi batos vin, kiam vi revenos!

– Tiuokaze mi restos vivi ĉi tie.

Subridinte post la dika vitro de la helmo, mi singarde elprenis malplenan provtubon el fiksilo sur ĵartelzono kaj enigis ĝin en la purpuran pulvoron. Mi fermis la ujon kaj realzonigis ĝin. Se al scienculoj ĝi ne taŭgos, mi lasos ĝin al mi – kiel memoraĵon. En la ĉielo brilis miliono da steloj, unu pli hela ol la alia! Nebulozoj kaj zonoj de asteroidoj dormeme drivis en la vakuo, ne atentante la homon, ravitan de ilia beleco, kiu staris en la blanka skafandro sur nekonata malgranda planedo. La firmamento de Cirkonio similis fantazian stelan kompton.

– Dora, ĉu vi ofte rigardas la ĉielon?

– Kion vi diris, pardonu?

– Rigardu la ĉielon, ĉu vi havas lukon apude?

Sekvis nelonga silento.

– Kio estas?

– Ĉu tio ne estas belega?

Peza spiro.

– Mi pli ŝatas la ĉielon de Tero. Urĝu vin tamen.

Ŝi estas neŝanĝebla. Aŭ mi ne estas ŝanĝebla, se taksi min el perspektivo de Dora. Malhela faŭko de kaverno jam montriĝis malproksime. Inter ĝi kaj mi estis preskaŭ ideale ebena surfaco de la planedo, kiu havis arĝentan koloron. Restis nur iom ĉirkaŭ dek minutoj.

– Dora, mi estas surloke. Mi eniras en la kavernon. Kie estas la robotoj?

– Ili jam veturas, – la voĉo de la Partnerino distordiĝis pro perturboj, kvankam la distanco ĝis la kosmoŝipo ne estis granda, – Ĉu ĉio estas ĉe vi en ordo? Trafiko ĉesas...

– Ĉio bonegas, mi vidas nenion specialan. La kaverno estas ordinara.

Per forto de miaj senzorgaj pensoj mi manipulis la ekranon de operatoro. Sur ĝi kuris bufrolinioj de informoj pri analizo de subteraj pasejoj. Baldaŭ la ekrano blinkis kaj montris skemon de la kavernoj. Ili ĉiuj kupliĝis unu kun alia, trapenetrante la supran parton de la krusto kaj glacia ŝildo. Pro tio Cirkonio similis purpuran pecon de fromaĝo. Hela lanterno eklumis sur la kapo kiel malgranda steleto. La lanterno lumigis malglatajn murojn kaj plankon, kovritajn de iaj flavaj ŝtonoj. Kie vagaĉas la robotoj kun konteneroj, ĝuste kiam ili estas necesaj? Ĉiam Dora ellasas ilin tro malfrue... Mi rgardis la negrandan ekranon, fiksitan sur la pojno. Palaj blinkantaj punktoj, kiuj estis miaj mekanikaj amikoj, lumis ĉirkaŭ proksimume je duonvojo al la kaverno. La tunelo kondukis min ĉiam pli profunden, kaj mi obeeme sekvis laŭ ĝi, rigardante flankojn. Korpojn de nigraj kristaloj sur muroj kompletigis flavaj ŝtonoj, pro kio ŝajnis, ke mi vidas abelon inverse.

Aha! Jen estas ĝi. Ĝuste tiu gaso. La aero ĉirkaŭe iĝis post ĉiu nova paŝo ĉiam pli malklara, mi iris kvazaŭ en malpura akvo. La koncentriteco de la gaso rapide kreskis, kaj mi povis nur ĝoji nerveze subridante, ke la helmo estis fiksita firme. La praktike sorĉa skafandro havis inter aliaj iloj porteblan analizilon. Tamen, ĝi estis tro malĝusta, por fari per ĝi iajn seriozajn konkludojn, ĝi povis fari nur proksimuman analizon de tokseco de la medio. Se diri maldetale, ĝi montris al mi, kien mi povas iri, kaj kien mi ne devas iri. Mi premis malgrandan bluan butoneton per fingro. “Mi ne povas identigi komponaĵojn de la gaso” – dormeme elparolis la aŭtomato en la maldekstran orelon. Kial do vi ne povas? Kuntirinte la brovojn, mi denove premis la butonon. “Mi ne povas identigi komponaĵojn de la gaso”. Ĉu ĝi difektiĝis?

Kaj tiumomente okazis tio, kion mi timis profundanime. Tio estis sento de malforta asfiksio. Kun timego mi vidis, kiel la gaso, kvazaŭ nubo de polvo, plenigis la helmon de mia skafandro.

– Kio estas tio?! Kiel tio eblas?! Dora! Dora!

Mi faligis la tenajlon kaj kroĉiĝis al la vitro de la helmo per la gantoj. Konvulsie mi kontrolis juntojn – ĉio estis hermetika, kiel antaŭ la eliro el la kosmoŝipo! Kiel la gaso povis penetri la skafandron?

– Dora, diablo prenu!

Responde mi sensis nur silenton kaj krakadon de perturboj. La spirado

fariĝis ĉiam pli malfacila, kaj mi, kaptadante la aeron per la manoj, falis sur la genuojn.

– Do... ra...

En la okuloj eksaltis diverskoloraj fajretoj. Mi preskaŭ rezignaciis, ke mi mortos malproksime de la hejmo, sed subite spiri iĝis pli facile. La gaso nenien malaperis, kiel nubo plenigante la helmon. Nur iamaniere mia organismo komencis adaptiĝi al ĝi. Post kvin minutoj mi surpiediĝis. La spirado fariĝis tiel facila kiel en montoj de Tero en dimanĉa mateno. La vidkapablo neordinare akriĝis – la lanterno jam ne estis necesa, ĉiuj konturoj ĉirkaŭe estis kvazaŭ ĉirkaŭliniitaj per nigra surstrekilo. Mi nedecideme malŝaltis la lanternon.

– Gastono? Hoj, kompano, ĉu vi estas ĉi tie?

Jam mi volis respondi, sed mi tuj komprenis, ke la voĉo aŭdiĝis ne interne de la helmo. Kaj la voĉo ne apartenis al Dora. Mi abrupte turnis min kaj ekvidis silueton de homo, kiu estis alta kiel mi. Baldaŭ la okuloj adaptiĝis al la mallumo plene, kaj antaŭ mi aperis... Ridetanta Frido, mia kamarado el la fluga akademio.

– Ĉu vi ne rekonas min, Gastono? – ĝoje ekkriis li, etendante la brakojn por saluto. – Kiel longe ni ne intervidiĝis! Venu, mi brakumos vin!

Frido ĉirkaŭpremis min kun neordinara forto, elpreminte lastajn restaĵojn de la aero.

– Oh! Frido, vi havas ŝtalajn brakojn! Ĉu halteroj ne kuŝas sen afero?

– Certe! – palpebrumis al mi la amiko. – Nun oni devas teni sin en formo. Ĉu vi trovis la gason?

– Atendu momenton... – mi kuntiris la brovojn kaj penis pensi sobre. – De kie vi aperis ĉi tie? Mi kaj Dora flugis ja duope!

– Kio okazis do al vi? Ĉu la helmo forte kunpremas vian kapon? Min oni enŝipigis en kargofakon ĝuste antaŭ la forflugo – ĉu vi ne legis vian flugoplanon?

– Mi devas konfesi, mi forgesis pri ĝi... – mi murmuris. Mi neniam legis la flugoplanon.

– Ho vi estas naivulo! Baldaŭ Natano alvenos!

Mia miro estis senlima. Mi tiel longe flugis al la nova planedo kaj mi ne sciis, ke en la kargofako sidis Natano kaj Frido! Jen tio estas surprizo! Certe, mi estis ĝoja denove ekvidi la amikojn, sed ia malklara suspekto malpermesis al mi esti trankvila. En la kapo estis bruo pro la gaso, kaj mi neniel povis koncentriĝi. Gastono, Frido kaj Natano. Ni estis nedisigebla trio, teruro por la tuta akademio – kaj ni estis denove kune sur la nekonata planedo! Mi larĝe ridetis – la flugado ĉesas esti enua.

– Knaboj, jen mi estas! – en la kavernon eniris Natano, larĝe ridetante, kiel ĉiam. – Nu do, ĉu ni prenus specimenojn kaj revenu hejmen?

La gajulo Natano frapis min sur la ŝultron. De la frapo mi apenaŭ restis sur la piedoj.

– Gastono, kial vi estas en la helmo? Ĉi tie oni povas spiri! – Frido frapetis al la dika vitro.

Mi ekpalpebrumis kaj, nesciante, kion respondi, necerte returnis negrandan ellasilon. Kun ŝuŝo la helmo apartiĝis de la skafandro. Mi singarde faris malgrandan spiron. Vere, oni povas spiri! Larĝe malferminte la okulojn pro miro, mi ekspiris per la tuta brusto. Ĉe la gaso aperis dolĉeta postgusto simila al frambkonfitaĵo.

– Bone, – Frido frapis per la gantoj, – Natano, elprenu analizilon kaj

havigu la specimenojn de la gaso. Mi eliros eksteren kaj esploros la atmosferon. Gastono, levu vian tenajlon kaj prenu la specimenon de ĉi tiea petro. Ni vidu, kiom da sekretoj kaŝas la tuneloj!

Mi entuziasme levis miajn instrumentojn de sur la tero.

– Knaboj! – mi kriis. – Kiel estas bone, ke ni denove estas trio en unu teamo!

Frido kaj Natano interrigardis kaj ekridis. La eĥo de ilia ridado impetis en profundon de la planedo.

– Vi fariĝis strangulo, Gastono! Nu, ni laboru!

Neniam mi sentis min tiom feliĉa! Mi eŭforiĝis enorme, kaj denove fajfante simplan melodion mi aktivigis la tenajlon. La grundo obeeme eniĝis en la malgrandan konteneron, kaj mi klinis min malsupren, kun intereso rigardante brilajn vejnojn sur la planko. Subite mi atentis flavajn ŝtonojn, kiujn mi rimarkis ankoraŭ ĉe la enirejo. Mi kaŭriĝis kaj prenis unu el ili. Ĝi estis brila. Preskaŭ kiel...

– Oro! – mi elspiris. – Tio estas ja... Tio estas ja oro!

– Kion vi murmuris tie? – Natano kriis al mi.

Kunglutinte, mi kunpremis la ŝtonon per la pugno kaj, ridetante mi turnis min al la malnova amiko.

– Hm... Nenion! Mi nur kantas kanton. “Ora aŭtuno”, ĉu vi memoras?

La ruĝvanga Natano suspekta fermetis la okulojn kaj minacis min per la fingro.

– Do deiru, Gastono! Kion vi gapas tie?

Li deŝovis min flanken kaj sidiĝis ĉe la ŝtonoj. Mi kunpremis la dentojn pro ĉagreno.

– Tio estas ja... – la kompano flustris. – Hoj! Hoj Frido! Venu pli rapide ĉi tien!

De malantaŭe aŭdiĝis piedfrapoj, kaj la anhelinta Frido aperis en la tunelo.

– Kio okazis?

– Vi rigardu! – Natano ŝovis antaŭ lian nazon la manplaton, plenan de brilaj ŝtonoj.

Frido faris forsvingan geston, sed poste li prenis unu pecon kaj preskaŭ tuŝante rigardis ĝin.

– Natano, tio estas...

– Jes! Tio estas oro! Ni estas riĉaj, amikoj! Ĉi tie ĝi tiom multas, ke ĉiu el ni povos aĉeti propran kosmoŝipon! Kaj ĝi sufiĉos, por aĉeti paron da eksterurbaj domoj sur Tero!

Frido faligis el la manoj la analizilon de aero kaj kune kun Natano sidiĝis ĉe amaso de dezirata suna metalo. Frido kaj Natano ekscitite komencis pridiskuti, kiel ili konsumos la neatenditan riĉaĵon, ridante kaj frapante unu la alian sur la ŝultrojn. Mi nerve ekhiis kaj iom flankeniris malantaŭen, tien, kie kuŝis la tenajlo. Mi hezitis unu minuton, kunpremis ĝin en la manoj kaj klinis min super la amikojn. Mi unua ekvidis ĝin. La tuta oro estos mia rajte – nur mi havas la rajton posedi ĝin! Ĉar... Ĉar mi alflugis ĉi tien kaj surterigis la diablan kosmoŝipon! La tenajlo peze malleviĝis sur la kapon de Natano, kaj li, ekstreminte, falis suben vizaĝe. Frido surpiediĝis kaj ekiris dorse.

– Kio okazis, Gastono?! Ĉu vi freneziĝis? Kion vi faras?!

Mi levis la tenajlon por nova bato. Kriante, mia amiko ŝirmis sin per la

manoj. La bato faligis lin teren, kaj mi, piedpremite lian bruston, faris ankoraŭ unu baton. Mi profunde enspiris kaj fermis la okulojn. Fino. Mi nur ĝisatindos la robotojn kaj kargos la oron... Poste mi revenos hejmen. Kaj mi estos riĉa – fabele riĉa!

– Bonega plano. Vi mortigis ilin ambaŭ!

Mi malfermis la okulojn. Preminte la tenajlon el ĉiuj fortoj, mi ĉirkaŭrigardis, sed ne komprenis, de kie mi aŭdis la voĉon.

– Hoj, mi estas ĉi tie.

Mi ŝovis la fingrojn en la malgrandan “poŝeton” de la skafandro. La postenulo de sur la monero ruze palpebrumis al mi.

– Bone vi elpensis tion! Ni aĉetos novan kosmoŝipon, kaj plu de neniu dependos... Nek de la akademio nek de la Centro de Flugado...

Mi perpleksiĝis. Kiel sorĉita, mi rigardis la ridantan metalan vizaĝon sur la monero.

– Ial mi eksentis min malbone...

La tenajlo sonore falis sur la plankon, kaj mi falis post unu momento.

Mi ne scias, kiom da tempo trapasis. Mi malfermis la okulojn kaj tuj mi rememoris ĉion, kio okazis en la kaverno. En mia kapo estis bruoj simila al mara surfo, kaj la naztruoj estis pikataj tiel, kvazaŭ en ilin oni verŝis acetan. Forpalpebrumante larmojn, mi surpiediĝis. Per la tremanta mano mi prenis la tenajlon, kaj mi turnis min al muro. Tien, kie kuŝis du...

Robotoj. Anstataŭ miaj amikoj tie kuŝis la robotoj. Ĉifaj, disbatitaj, ili fajreris kaj konvulsiiis. Sur unu el ili videblis ruĝa litero “alfa”, sur la alia – verda litero “beta”. Kiam sukcesis ili veni? Kaj kien malaperis la kadavroj de Frido kaj Natano? Mi ĵetis min al la oro. Sed anstataŭ ĝi estis ordinaraj, flavaj ŝtonoj. Mia dorso kovriĝis per malvarma ŝvito. Sur la planedo ekzistis nur unu homo, kiu povas fari tion. Dora. Ŝi estis do... Ŝi formetis la kadavrojn. Ŝi prenis la oron kaj lasis la robotojn, por ke mi ekpensu, ke kvazaŭ mi ĉion nur viziis. Ha!

El la naztruoj ekfluis strietoj de la sango. En la kapo ĉiam pli forte bruas pro la damnita stranga gaso. Mi starigis min kaj eliris el la kaverno, kunpremante la tenajlon por havigo de grundo. Tra perturboj aŭdiĝis radiosignalo de la kosmoŝipo:

– Gastono! Gastono, mi petas, respondu! Bonvolu!

– Dora?

– Ho dank' al Dio, vi estas viva! – ekscitite kriis Dora al mi en la orelon. – Kio okazis, kie vi estis tiom longe? Kaj kio okazis al la robotoj – mi perdis ĉian radiosignalon! Mi timis, ke vi...

Mi pesis la tenajlon per la manoj.

– Dora, trankviliĝu. Mi scias ĉion. Renkontu min ĉe la kosmoŝipo, ni devas... Ni devas pridiskuti ion.

Elrusigis Sergej Dmitrenko (Alatiro, Ĉuvaŝio)

Ili batalis kontraŭ nazioj en la 2-a mondmilito


En la antaŭa numero honore al la 75-jariĝo de la Venko super nazia Germanio estis publikigita listo de esperantistoj, soldatoj kaj oficiroj de la Ruĝa armeo, kiuj partoprenis la militon. La biografiaj donitaĵoj pri ili estas diversampleksaj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj estas menciitaj, kaj foje en la informojn enŝteliĝis eraroj. Tiaj eraroj troveblas en la skizo pri Semjon Podkaminer. Por korekti ilin, ni publikigas ĉi tie rememorojn de lia nepino, en kiuj la donitaĵoj estas korektaj.

Krome, estis tute ne menciita elstara esperantisto Andrej Rogov. Por rekompensi tiun eraron, ni publikigas skizon pri li de lia Esperanto-lerninto Mikaelo Bronŝtejn.

Ni petas legantaron de CkK laŭeble kompletigi la liston kaj indiki enŝteliĝantajn erarojn, kiuj, ve!, estas neeviteblaj. *La red.*

Mia avo Semjon Podkaminer

Mia avo, Semjon Naumoviĉ Podkaminer, naskiĝis en Tula 11.02.1901. La nomoj Semjon kaj Naum estis tradiciaj en la familio. Kiam naskiĝis mia avo, lia patro estis milita dirigento de orkestro, kaj la familio transloĝiĝadis el unu urbo al alia kune kun la oficejo de la patro. La praavo finis Peterburgan kaj Varsovian konservatoriojn, kaj ankaŭ la avo bonege ludis violonon kaj fortepianon. Mia avino nomiĝis Malvina Aleksandrovna, fraŭlina familia nomo Miĥlajeva. Antaŭ sia edziniĝo ŝi loĝis en Odeso, kie ankaŭ la praavo naskiĝis, ŝajnas, ke ŝi laboris en ĉapela metiejo. La infanaj jaroj de mia avo pasis en Polujo, en Lodzo li loĝis ĝis 4 jaraĝo, poste en Varsovio. Li libere parolis pole de tiu



tempo. Li havis la fratino Amalia-n (Emme-n), je 4 jaroj pli junan. Poste ŝi finis Leningradan konservatorion, antaŭ la dua mondmilito ŝi estis teatra cenzuristo de Leningrado.

En gimnazio li lernis en Odeso, kun siaj gimnaziaj kamaradoj – Vladimir Rozenberg, Sigismund (Zjazja) Lublin – li amikis dum la tuta vivo, mi memoras, kiel venis kun la avo al ili gaste. Ili loĝis en Leningrado. La avo bone lernis, la plej grandajn sukcesojn li havis en la lingvoj – la latina, angla, germana, franca. Kiam la avo estis en la finaj klasoj, la familio transloĝiĝis al Petrogrado. Al la praavo oni proponis ekvidi filharmonion de Jerusalemo en 1916, sed li rifuzis kaj elektis Petrogradon. Ĉi tie li havis propran muziklernejon, en kiu instruis elstaraj muzikistoj, ekzemple, la kantisto Figner. La lernejo troviĝis sur la strato Nadejdinskaja 34, poste sur Arhijereskaja 1-3.

La avo lernis en gimnazio de Lentovskaja (nun mezlernejo n-ro 47). La praavo devis doni koruptaĵon, por ke oni prenu tien la avon, ĉar por la judoj ekzistis kvanta limigo, kaj en la unua jaro oni akceptis alian infanon, kaj al li rifuzis. La gimnazio de Lentovskaja estis konsiderata demokratia, tie lernis infanoj de “maldekstraj” inteligentuloj. La instruistoj salutis lernantojn per manpremoj, alparolis ilin je “vi”. En la sama klaso kun mia avo lernis filoj de akademiano Oldenberg, la fama poste Wolf Messing⁴.

Sur la placo Lev Tolstoj (nuna nomo) estis kinejo “Ars”. Mi memoras, kiel en infanaĝo vizitis ĝin kun la gepatroj. Tio estis malnova kinejo. Kiam la avo estis juna, li kromlaboris tie kiel pianisto, tiam ekzistis senŝona filmoj. Dum lernopaŭzoj la gimnazianoj kuris al la bakejo “Lora”. Tie estis konkursoj – kiu manĝos 10 tortetojn, ricevos ilin senpage.

En 1918 la gimnazianoj de Lentovskaja finis la kurson, kaj la klaso displitiĝis je du partoj – unu iris batali por la blankuloj, la alia – por la ruĝuloj... La avo aliĝis al la ruĝa armeo. En la tranĉeoj li konatiĝis kun ruĝarmeano, kiu montris al li lernolibron de Esperanto, kaj tiel li fariĝis esperantisto kaj dediĉis al la movado signifan parton de sia vivo.

Post la interna milito la avo ricevis du universitatnivelaĵajn kleriĝojn – kiel transporta inĝeniero kaj kiel historiisto. Kiel la plej bona studento de la supera lernejo (mi ne povas diri precize, kie li studus – al mi ŝajnas, en Politeknika Instituto), li estis sendita por 3 monatoj al staĝo en Svedio, kie devis trapasi ĉiujn ŝtupojn de studado. Li komencis de la helpanto de maŝinisto de lokomotivo. Li rifuzis de interpretisto kaj ekloĝis en familio, kie lernis paroli svede. Reveninte, li decidis labori instruisto de historio, kaj ricevis la lokon en Sestrorecko. La trajno de Petrogrado-Leningrado veturis tien dum 4 horoj. Sur la vagonoj estis tabuletoj: “Levita de la fundo de la lago Bajkalo en 1908”. La lokomotivon oni hejtis per lignaĵo. Meze de la vojo ĉiuj pasaĝeroj devis eliri el vagonoj kaj pretigi lignaĵon, post kio la trajno povis daŭrigi la vojon.

La avon oni direktis instrui al la plej malobeema naŭa klaso. Post la unua leciono el la klaso eksonis bruo, la direktoro ĵetis sin tien, pensante, ke tie oni ofendas la junan instruiston, sed evidentiĝis, ke la klaso starante aplaudiis al li.

⁴ Evidenta eraro – W. Messing neniam lernis en peterburgaj gimnazioj, kaj en la periodo de la 1-a mondmilito ĝenerale troviĝis sur teritorioj de Aŭstrio-Hungario kaj Germanio.

En Sestrokeco la avo vizitadis poŝtejon kaj enamiĝis al knabino, kiu tie laboris. Ŝi nomiĝis Vera Nikolajevna Leontjeva, li edziĝis al ŝi post 4 jaroj de amindumado. Li organizis en Sestrokeco Esperanto-rondeton, kiun vizitis ĉiuj kvin fratinoj Leontjev.

Tamen agado de inĝeniero pli allogis la avon, kaj li kun la avino ekloĝis en Leningrado sur Petropavlovskaja 4, loĝejo 34. Tio estis eksa loĝejo de la angla ambasadoro, forveturinta post la revolucio, ĝin ricevis la avo kun la tuta meblaro, kiel dekano de fakultato. En 1928 naskiĝis mia patro Oleg, en 1933 – lia pli juna fratino Marlena.

En 1939, kiam komenciĝis la milito kun Finnlando, la avo estis rekrutita al armeo. Oni bezonis homojn kun scio de fremdaj lingvoj por politika skoltado. En ilia fako kolektiĝis poliglotoj, homoj de diversaj profesioj – filologoj, artologoj, ktp, posedantaj po multe da lingvoj. Kiel rakontis la avo, ilia fako okupiĝis pri politika propagando, sed mi pensas, ke tio estas nur parto de la vero.

En la armeo la avo troviĝis ĝis 1949. Li havis ordenojn: de la Patrolanda milito de la 1-a grado, 3 de la batala ruĝa standardo kaj multajn medalojn. Multajn jarojn poste oni proponis al li verki kelkajn rakontojn pri la milito por iu jubilea kolekto, sed rezulte ne publikigis ilin pro la motivo, ke ilia enhavo ĝis nun enhavas militajn sekretojn.

Dum la Patrolanda milito la avo troviĝis en Leningrado, li gvidis kontraŭskoltan fakon de Leningrada fronto. Pro skorbuto ĉe li elfalis dentoj kaj haroj. Ekzistas pluraj atestoj, ke li savis de la malsata morto diversajn homojn, ekzemple, la edzinon kaj filon de sia pereinta gimnazia amiko. Foje, kiam li enketis militkaptiton, je la demando, kiujn fremdajn lingvojn li posedas, la germano respondis – Esperanton. La avo rakontis, ke li tre volis interparoli kun la esperantisto en la amata internacia lingvo, sed li tion ne faris, tamen savis vivon de tiu homo. Dum laboro kun kaptitoj el la hispana “Blua divizio” li devis dum 3 monatoj ellerni la hispanan lingvon, ĉar la interpretistoj, hispanaj komunistoj, tro malbone posedis la rusan kaj ilin malfacilis kompreni.

Multajn unikajn objektojn kaj dokumentojn de tiu periodo li transdonis al Muzeo de historio de la blokado, kiu poste estis fermita. Fine de la milito la avo estis en Germanio, kaj poste ankoraŭ du jarojn estis en Germanio kaj Aŭstrio, en la sovetiaj okupaciaj zonoj.

Kiam USSR vizitis la usona prezidento Eisenhower, la avo estis lia interpretisto.

En 1949 la avo estis arestita en kadroj de la “Leningrada afero”. Ĉiuj laborantoj de lia fako skribis pri li bonegajn karakterizojn kaj pledis pri lia liberigo, garantiante pri li, kio estis malofta okazo en tiu historia epoko. Mem li diris, ke li bonŝancis – lia esploristo ekmalanis, oni nomumis la alian, kaj tiu nova, rigardinte la materialojn, kaj konsiderante la bonegajn karakterizojn, ne trovis iun krimon, kaj oni la avon liberigis.

Post tio li malmobiliziĝis el la armeo kaj eklaboris en Akademio de la civila aertrafiko, fariĝinte fine ĝia rektoro.

Post morto de Stalin eblis denove okupiĝi pri Esperanto, kaj la avo ekaktivis. Mi memoras, ke li ricevadis ĉiutage po 15-20 leteroj de esperantistoj el la tuta mondo, kaj al mi trafis la poŝtmarkoj, tial mi tre atente sekvis lian

korrespondadon. Krome, li ricevadis gazetojn en diversaj lingvoj kaj ĉiam aŭskultis radion en la franca kaj germana, kiuj ne estis mutigataj.

La avo vizitis eksterlandon pri la porpacaj aferoj, kaj tie renkontiĝis kun esperantistoj. Li estis ĉe akcepto de la nederlanda reĝino, vojaĝis al Japanio, Hungario, Belgio kaj aliaj landoj. Krom la oficaĵaj okupoj, li prelegis pri la internacia situacio kaj estis tre fama kaj populara preleganto. Lia temo estis Usono, Anglio, Francio, Germanio, Japanio. Li regule vizitis la Nacian bibliotekon por legi eksterlandajn gazetojn. Eĉ en la biblioteko ili estis cenzurataj: oni eltranĉadis el ili plenajn artikolojn, kiun estis “malutile” legi al sovetiaj homoj. Tial li legis la sekvajn numerojn, kie troviĝis reeĥoj pri la eltranĉitaj artikoloj, kaj komprenis, pri kio temis.

Foje mi vidis, kiel la avo prelegis. Oni invitis lin al la cirko por ke li rakontu al la artistoj pri la lando (Nederlando), kie ili devis gastoli. La avo prenis min kun si al postkulisejo de la cirko kaj mi observis, kun kia atento oni lin aŭskultis (Oleg Popov en la unua vico) kaj poste aranĝis ovacion al li.

Kiam mi havis 11 jarojn, la avo instruis al mi Esperanton proksimume dum unu monato de somera ripozo, kaj ni kune veturis al la somera Esperantotendaro en Baltio. Mi diru, ke, kvankam mi ne estas aktiva esperantisto, tio fariĝis parto de mia vivo – mi akiris amikojn kaj grandvalorajn impresojn dum la tuta mia vivo. En 1978 ni estis en UK en Bulgario, kaj tie mi reale ekkonsciis, kiom multe da homoj konas kaj aprezas mian avon, kaj kiom multe li faras por la movado de esperantistoj.

Ĝenerale, mi multon ŝuldas al mia avo. Mi opinias, ke li estis la sola homo, kiu okupiĝis pri mia edukado. Mia avino mortis en 1969, kiam mi iris al la unua klaso, kaj de tiu tempo la avo komencis vivi en nia familio kaj ni transloĝiĝis en komunan loĝejon. Li sidis kun mi, kiam mi malsanis kaj ne vizitis lernejon, helpis pri hejmaj taskoj, prenis min kun si al somera ripozo en Baltio, vizitis kun mi teatrojn, legis al mi poemojn kaj instruis danci valson kaj tangon. Tamen foje li kontrolis miajn telefonajn interparolojn kun samklasanoj, kiujn mi efektivigis en la hispana speciale por ke la gepatroj ne komprenu, pri kio temas.

Ĉio, pri kio mi ĉi tie skribis pri lia vivo, mi scias el liaj rakontoj.

En 1982 miaj gepatroj forveturis por ripozo, kaj mi kun la avo restis duope. La avo ekmalsanis je iu nekomprenebla malsano kaj neniel resaniĝis. Tiam mi iris en la urban militan komandejon kaj postulis ke oni direktu la avon en militistan hospitalon, kaj ricevis la koncernan dokumenton. Kaj mi sendis lin al la hospitalo ĉe Suvorov avenuo. Tie finfine ekklarigis la diagnozo: leŭkemio, de kiu kuraci okdekjarulon ne eblis. Baldaŭ la 28.09.1982, la avo mortis en la hospitalo. Al la entombiga ceremonio kolektiĝis proksimume 300 homoj. Estis multe da floroj kaj florkronoj. Subite alveturis la aŭto “Volga”, el ĝi eliris duopo, metis ankoraŭ unu kronon kaj forveturis. Sur la rubando ni legis: “Al prezidanto de la societo de veteranoj de la sovetia kontraŭskolta servo”. Kaj ni tute ne sciis pri tiu parto de lia vivo... En Sestroreĉko en la tombejo mi metis tabulon el malhela ŝtono sur lian komunan kun la avino tombon.

24.01.2012, Sankt-Peterburgo

Vera Androĥanova (Podkaminer)

Etrusigis Nikolao Gudskov

Andreo Rogov kaj lia neefektiviginta revo

1. *Lia vivo ekster Esperanto-movado*

Esperanto estis la ĉefa afero de lia vivo, tamen ne unusola. Heroa militinto, estimata instruisto, zorgema patro, verva ĝardenisto, klerega sciencemulo, adorato de virinoj – ĉiun aferon en sia vivo li plenumis fervore kaj plensukcese.

Andrej Borisoviĉ Rogov naskiĝis en 1914 en Ĉornij Ostriv, urbeto de Kamjanec-Podilska distrikto. Mi ne estas bone informita pri lia infanaĝo, ankaŭ lia frato, lokinta la familiajn rememoraĵojn en Interreto, ne multe rakontas pri tio. Mem Andrej Borisoviĉ skribis, ke lia patro estis advokato, kaj ke la gepatroj forpasis, kiam li estis tute juna. Tre kapabla pri lingvostudo, li post sepjara lernejo ekstudis la anglan kaj la germanan en Kamjanec-Podilska teknika lernejo de fremdaj lingvoj, diplomiĝis tie en 1934 kaj, pro alvoko de tiama ŝtatregistaro, eklaboris en vilaĝaj lernejoj kiel fremdlingva instruisto. Koresponde li studis la ukrainan kaj la rusan lingvojn kaj literaturojn en la pedagogia instituto de Vinnica, kaj en 1938 eklaboris en la mezlernejo de vilaĝo Ivankivci. La instruista laboro daŭris nelonge pro eksplodo de la dua mondmilito.

Rekrutita en la sovetan armeon en 1939, Rogov agis dum la tuta milito kiel oficiro-tradukisto en militesplora taĉmento. Mi ne dubas, ke li agis heroe, multfoje irante trans la frontan linion por kapti naziajn oficirojn kaj ricevi de ili gravajn informojn, – tion atestis multnombraj ordenoj kaj medaloj, per kiuj la ŝtato honorigis lin dum la milito. Ankaŭ de la bulgara registaro li ricevis medalon «Pro la heroeco», ĉar organizis ligan inter la sovetan armeon kaj partizanojn en Rodopoj. Dufoje li estis grave vundita, sed post kuracado revenis al la fronto. Post la venko li ne tuj revenis hejmen – oni lasis lin militservi en Vieno kiel helpanton de la sovetia militataŝeo.



Reveninte al la familio, lasita en vilaĝo Ivankivci, (tiutempe li jam havis du filinojn, la tria naskiĝis poste), Andrej Borisoviĉ iĝis vicdirektoro de la vilaĝa lernejo kaj laboris en la lernejo ĝis la emeritiĝo.

Granda ĝardeno, kiun Rogov prizorgis apud sia loĝdomo en Ivankivci, ravis ĉiun lian gaston. Tie estis pomarboj, ĉiujare donantaj abundan rikolton. En la granda seka kaj malvarma kelo la mastro aranĝis longajn bretojn, sur ĉiu breto estis ŝildeto: «Aŭgusto», «Septembro» kaj tiel plu ĝis «Julio». Sur la bretoj kuŝis pomoj, apartigitaj laŭ la specoj, kaj la ŝildeto montris, en kiu monato oni manĝu certajn pomojn – do li havis la pomojn por manĝo dum la tuta jaro! Prunoj, ĉerizoj, merizoj, piroj ankaŭ ne mankis en la ĝardeno, sed la plej zorgataj estis vitoj. Tiujn Andrej Borisoviĉ ŝategis kaj ricevadis branĉetojn por greftado de siaj amikoj bulgaraj, hungaraj, rumanaj k.a., entuziasme greftadis, vartis, do estis vera plezuro septembre vidi belegajn vinberajn grapolojn, relumantajn ĉe la sunradioj. En la lageto naĝis karasoj, en kelkaj kaĝoj svarmis kunikloj, kokinoj promenis en la korto... Efektive, mi miras, ke ĉe sia streĉa lerneja laboro kaj ĉe tiu granda mastro li trovis tempon ankaŭ por aliaj okupoj.

En la lastaj vivojaroj Rogov, jam kiel emerito, ekgvidis elsendojn de loka radio en la granda Radiouzino, en Ĥmelnickij (iama Proskuriv). Li restadis same aktiva kaj vivĝoja, kaj lia vivo povus daŭri multe pli longe, sed, estante nur 64 jarojn aĝa, pro misago de nesperta kirurgiisto ĉe tute triviala operacio, Andrej Borisoviĉ forpasis en 1978.

2. Kio li estis por ni, lernantoj

Certe, lin donacis al mi mia malavara destino, lokinta mian naskiĝon kaj infanaĝon en la ukrainia urbo Proskuriv. Mi opinias, ke, se mi ne renkontus lin en mia infana aĝo, mia tuta vivo estus absolute alia – eble, pli trankvila, sed senesenca, senkolora kaj multe malpli eventoriĉa.

En septembro 1961 inter kelkdeko da knaboj mi venis al Klubo de Internacia Amikeco (KIA), funkciinta en la urba Palaco de Junpioniroj ekde 1959. Laŭ mia memoro, estis nur knaboj en la aĝo de 11 ĝis 15 jaroj. Kial nur knaboj? Ĉar oni sciis en la urbo, ke gvidanto de KIA estas eksa oficiro, militesploristo, honorigita per multaj ordenoj kaj medaloj. Tiajn personojn ege estimis miaepoka postmilita knabaro.

Efektive tia li estis, nia Instruisto, Andrej Borisoviĉ! Ni venis al li por vidi la heroon-militiston kun liaj medaloj, sed ni restis por lerni la lingvon kaj aktivi en KIA ne pro tio. La Instruisto malavare dividis kun ni sian vervon kaj entuziasmon. Por la lecionoj li senĉese inventadis atentokaptajn vortludojn, dialogojn, grupajn ekzercojn; ni lernis multajn poemojn kaj ukrainajn kantojn, kiujn li tradukis en Esperanton. La lingvo, dank' al lerta prezento de Andrej Borisoviĉ, estis loganta per sia beleco kaj tuja alireblo. Pro tio nur post dumonata lernado mi kun mia magra lingvokono eĉ kuraĝis fari mian unuan kantotradukon kaj montri ĝin al la Instruisto. Kiel agus simpla pedagogo ĉi okaze? Do eble, tia iom laŭdis min kaj dirus, ke mi devas pli diligente lerni la lingvon kaj akiri firman bazon por bonaj tradukoj. Rogov ne estis simpla pedagogo, li estis la Instruisto, kaj li agis alimaniere. Li sendis mian unuan tradukon al konata esperanta poeto en Vilnius, petante ke tiu serioze komentu mian fuŝlaboron. Kaj mi, dekdujara knabo, ricevis kvarpaĝan komenton de la famulo kun kelkaj laŭdoj pri trafaj lokoj, kun prudenta kritiko de la maltrafaj kaj kun bonkoraj konsiloj! Certe, estis ĝuste tiu

letero, ricevita per zorgoj de la Instruisto, kiu kuraĝigis min kaj movis al tio, kio mi estas nun.

Kompreneble, ne nur al mi li rilatis tiel. Afablan helpon kaj asiston de Andrej Borisoviĉ ricevadis ĉiuj liaj lernantoj. Al unu li helpis per adresoj de insigno-kolektantoj, por alia aranĝis viziton al urĝe bezonata kuracisto...

Loĝanta nun apud Sankt-Peterburgo, mi trovas tempon por viziti mian naskiĝurbon ĉiun trian aŭ kvaran jaron. Tie restas miaj parencoj, la tomo de mia patro... Sed nepra ero en la programo de mia restado en Ĥmelnickij estas renkontiĝo kun la iamaj gelernantoj de Andrej Borisoviĉ Rogov. Deko da urbanoj, ve, preskaŭ samaĝaj kun mi, venas al la gastama loĝejo de Valentina Korsun, kaj ni havas tre-tre agrablan vesperon kun rememoroj, kantado, teo kaj kukoj. Sed ne nur tie mi renkontas la disĉiplojn de Rogov. En 1999 ĉe mia veno en Londonon eksteratende min renkontis Olga Kerzjuk, iama Ĥmelnickanino, esperantistigita de Rogov jam post mia definitiva forveturo el la urbo. Esperanto, ricevita de la Instruisto helpis ŝin trovi sian lokon en la mondo: nun ŝi prizorgas ukrainan literaturon en la mondfama British Library – la ĉefa biblioteko de Britio.

3. *Kio li estis por la Esperanto-movado*

Lerninta Esperanton knabaĝe en 1927 pere de la lecionoj, aperintaj en porinfana ĵurnalo «Pionerskaja pravda», Andrej Borisoviĉ ne trafis en la teruran muellon de la Granda Purigo, lanĉita de Stalin dek jarojn poste. Fakte, ĉiuj plimalpli elstaraj esperantistoj de tiu epoko kaj eĉ multaj simplaj uzantoj de la lingvo por internacia korespondado, estis reprezaliitaj – ekzekutitaj, ekzilitaj, humiligitaj. Nur en la komenco de t.n. «varmiĝo de Ĥruŝĉov» la postvivintaj ŝatantoj de la internacia lingvo komencis renaskiĝon de la movado, kaj unu el ili estis Rogov.

Nuntempa junularo apenaŭ povas imagi, kiel en la epoko sen Interreto, sen poŝtelefonoj, eĉ sen bonkvalita interurba telefonado la esperantistoj povis plimalpli normale kontakti, trovi unu la alian, organizi renkontiĝojn, interŝanĝi informojn... Sed ja estis tio.

Andrej Borisoviĉ, informita de iu baltlanda amiko, komencis vizitadi la unuajn renkontiĝojn de esperantistoj – Baltajn Esperanto-tendarojn (BET) – ŝajne, ekde la Tria BET; la Kvaran kaj postajn li jam venadis kun siaj gelernantoj. Inspirita de la neforgesebla esperantuja etoso, Rogov decidis kontribui al la informado de esperantistoj. Dum multaj jaroj li tajpadis «Ukrainajn Esperanto-Infojn», dissendatajn perpoŝte al dudek adresoj en diversaj partoj de Sovetio, kie ekĝermis la Esperanto-movado. Poste aperis ankaŭ «Poeziaj kajeroj» – Andrej Borisoviĉ decidis konigi literaturajn atingojn de la movadanoj.

Li, ŝajne la unua en la lando, aĉetinte du magnetofonojn, lanĉis interŝanĝon de «Parolantaj leteroj» ene de Sovetio kaj kun eksterlandaj amikoj. Mi bone memoras i.a. la atentokaptan bendon el Novzelando kun rakonto pri vivkutimoj de la Maoria popolo. Dum kelkaj jaroj de la SEJM-epoko Rogov eĉ gvidis la Magnetofonan servon de SEJM, kompilinte liston de 60 diverstemaj sonbendoj, kies kopion rajtis mendi ĉiu klubo. Tiun ĉi paperan liston mi posedas, sed pri sorto de la sonbenda arkivo scias nenion.

Nemultenombra, sed ja la unua (!) postmilita renkontiĝo, kiun partoprenis esperantistoj el Kievo, Drohobiĉ, Derajnja kaj aliaj urboj, ankaŭ estis aranĝita de li en Ĥmelnickij, en 1962. Kompreninte gravan rolon de la movada junularo, antaŭ ol multaj pliaĝuloj ekkonsciis ĝin, en 1965 Andrej Borisoviĉ post

interkonsento kun Anatolo Gončarov, iniciatinto de la fama SEJM, preparis kaj eldonis la unuan numeron de la revuo «Juna Esperantisto», aperintan eĉ antaŭ proklamo de mem SEJM!

Preskaŭ ĉiujare Rogov fervore veturadis al multaj renkontiĝoj de esperantistoj. Trairinta dum la milito duonon de Eŭropo, poste, malgraŭ multaj petskriboj al oficialaj instancoj, li neniam ricevis permeson forlasi la landon. Sed ja estis enlandaj renkontiĝoj, do al BET, al SEJT, al la regionaj renkontiĝoj Andrej Borisoviĉ venadis regule, kaj lia partopreno ĉiam estis atendata kaj ekstreme utila: li prelegis, instruis, kunorganizis festojn, koncertojn kaj estis ŝatata en la Esperantujo same de la aĝuloj kaj de la junularo.

En nia marĉandema tempo oni nepre devas emfazi, ke neniam palpeblajn bonaĵojn – nek monon, nek valorajn donacojn provizis lia senlaca laboro. Ĉion, vere ĉion por Esperanto, li faris proprakoste kun sincera malprofitemo.

4. *La revo*

Literaturaj okupoj en Esperanto estis inter la plej ŝatataj de Andrej Borisoviĉ Rogov. Nemultajn sed belajn originalajn poemojn li verkis, mi ŝatus prezenti ĉi tie nur unu lian korŝiran poezian konfeson:

Alvokisto

*Mi, Til Eŭlenŝpigel
en tristo
staras en strat' –
alvokisto.
Mi por Esperanto
alvokas,
fervore ĝin lerni
provokas.
Homaro en hast'
preteriras,
eĉ scii pri ĝi
ne deziras.
Se homo jam havas
hobion,
li krome deziras
nenion.
Por tiu hobbio –
malsano,
por tiu alia –
romano.
Por tiu malhelpas
riĉeco,
por tiu jam –
maljuneco.
Tiu jen estas
sportisto,
alia –*

*filatelisto.
Por li ne permesas
simpleco,
por ŝi ne permesas
beleco.
Jen stumblas sendube
drinkulo;
por li Esperanto ja –
nulo.
Ja surdas la hom'
profitulo,
des pli – sen anim'
potenculo.
Ho, kiu persono
kaj kia
por lingvo
internacia?
Aj, nun altruistoj
forestas!
Ho kie, ho kie
vi estas?..
Kaj staras sur strato
en tristo
sen iu esper'
alvokisto.*

Tamen ĉefe Rogov koncentriĝis ĉe traduka, organiza kaj instiga laboro. Tre grava estas lia rolo en la procezo de rekonigo de la literatura heredaĵo de Vasilj Jeroŝenko. Rogov kontaktis diverslandajn esperantistojn, kiuj persone konis la blindan verkiston. Ili sendis multajn valorajn materialojn, kiujn Andrej Borisoviĉ poste transdonis al esploristoj de la vivo kaj verkaro de Jeroŝenko.

Fidinde kaj bele Rogov tradukis multajn poeziajn verkojn de rusaj poetoj, precipe la verkojn, kiuj ial restis ekster la lerneja programo, do nekonatajn por averaĝa civitano. Inter tiuj estis grandaj poemoj «La najtingala ĝardeno» de Aleksandr Blok, «Fraŭlino kaj Morto» de Maksim Gorkij kaj multaj aliaj. Eĉ kun plia fervoro li tradukadis ukrainajn poemojn kaj kantojn – ekde la mondfamaj verkoj de Taras Ŝevĉenko ĝis la kortuŝaj poemoj de modesta vilaĝa poeto Mikola Kolodij.

La obseda kelkjardeka revo de Andrej Borisoviĉ estis preparo kaj eldono de la «Ukraina antologio», simila al ĉina, itala, japana kaj multaj aliaj naciaj poeziaj antologioj, jam eldonitaj en Esperanto. Li volis konigi ĉarmon de la poezio de sia naskiĝlando al la monda esperantistaro kaj ne avaris sian tempon kaj siajn kapablojn por tio.

Kiel li agis? Kosciante, ke tian laboregon ne eblas efektiviĝi en soleco, li eltrovadis en Ukrainio kaj ekstere, en aliaj respublikoj, esperantistojn verkemajn kaj tradukemajn. Li invitis ilin kunlabori en siaj «Poeziaj kajeroj», vekante ilian verkemon per publikigo de la poemoj originalaj kaj tradukitaj. Tiel formiĝis la listo de pli ol 30 kunlaborantoj pri la antologio. La liston mi trovis inter liaj dokumentoj, kiujn mi ricevis herede. Kompreneble, tiuj ĉi homoj ne estas egalvaloraj laŭ la sperto, talento, klero ktp – ekzemple, mi tiutempe estis absoluta flavbekulo deksesjara, farinta dekon da tradukprovoj – sed Rogov ambiciigiis ĉiujn por la komuna granda laboro kaj multaj personoj el la listo volonte konsentis kunagi.

Li skribis al multaj tiutempaj ukrainaj poetoj kaj literaturistoj – certe, kelkaj ne respondis, aliaj respondis malafable kaj negative, sed certan kvanton da subtenaj respondoj, liadire, li estis ricevinta.

Kunlabore kun kelkaj elstaraj ukrainaj esperantistoj li pripensis planatan enhavon de la antologio. Mi vidis tiun projekton surpapere – ĝi ŝajnis al mi treege ambicia, apenaŭ plenumbla per la fortoj, kiujn ni tiam havis, sed ja tre alloga kiel bela ideo. Tie estis prezentitaj ĉiuj epokoj kaj ĉiuj ĝenroj, la tuto de evoluo de la nacia literaturo, nemulte da prozaj fragmentoj tradukendaj, sed multege da poezio. Mi supozas, ke, se la laboro estus finfarita, ĝi prezentus almenaŭ du dikajn volumojn – la kremojn de la ukraina literaturo.

Li komencis distribui la materialojn inter la personoj el la kompilita listo, kiuj konsentis kunlabori. La personoj eklaboris, kaj li, ricevante la tradukojn, elektis la plej bonajn kaj publikigis ilin en la «Poeziaj kajeroj». Ne ekzistis tiam, antaŭ kvindek jaroj, la modernaj multobligaj rimedoj; Rogov devis kvarfoje retajpi la samajn paĝojn per simpla tajpilo, donanta bonan kvaliton nur por kvin folioj, metitaj kun kopipapero. Dudek ekzemplerojn de ĉiu kajero li dissendis al la tradukistoj kaj al kelkaj gvidantoj de grandaj esperantistaj grupoj, petante reeĥojn kaj konsilojn. Post finkorektado la tradukoj estis orde dismetataj en kelkajn

paperujojn laŭ la periodoj historiaj. Kredindas, ke al 1977 la tasko estis farita ne malpli ol 50-procente.

5. *Ĉu ĝi realiĝos?*

En 1977 Andrej Borisoviĉ subite ekokupiĝis pri jure konfirmita testamento, per kiu heredanto de la tuta havaĵo, rilata al Esperanto, devus iĝi mi. Li montris al mi la testamenton, kaj mi, memkompreneble, demandis, ĉu ne tro frue li estas faranta tion. Ja tiam li havis nur 63 jarojn. «Ĉio povas okazi...» – estis lia respondo, kaj la postaj eventoj montris, ke li havis ĝustan antaŭsenton.

Veninte al Ĥmelnickij post lia forpaso, mi renkontiĝis kun la esperantistoj, kaj diris, ke mi rezignas de la heredaĵo, lasita al mi de Andrej Borisoviĉ, se ĝin konsentos preni la ĥmelnickanoj. Estis transdonitaj al ili Esperanto-libroj kaj ĉiuj arkivaĵoj; mi kunprenis nur la tajpilon, bezonatan por mia tiama laboro. Nun tiu portebla tajpilo estas antikvaĵo, kaj mi volonte redonos ĝin al la ĥmelnickanoj – eble, iam ili maturiĝos por krei muzeeton de Esperanto-movado en la urbo.

Sed – la materialoj, akumulitaj de Rogov por la Ukraina Antologio, forestis ene de liaj arkivaĵoj! Al kiu li transdonis ilin? Nu, supozeble, al iu tradukanto el sia listo, sed ne al mi, loĝanta tiam jam dum pluraj jaroj en Rusio. En 1993 mi ricevis dukilograman sendaĵon el Ufa de Boris Kolker, foriranta tiujare al Usono. La sendaĵo enhavis dikan paperujon kaj etan skribaĵon de Kolker: «...forveturante por ĉiam, mi sendas al vi tiujn ĉi materialojn, kiujn mi ricevis diverstempe de Andreo Rogov. Eble taŭgos...». En la paperujo estis deko da numeroj de «Poeziaj kajoroj» diversjaraj, tajpitaj rememoroj de Rogov pri kelkaj BEToj kaj kelkaj numeroj de la revueto «Velo», kiun mi eldonadis kun helpo de Andrej Borisoviĉ 15-ekzemplere en 1966-68. Sed – neniam signoj de la Antologio! El la «Poeziaj kajoroj» mi prenis kelkajn liajn tradukojn, aldonatajn al tiu ĉi teksto. Tie estas pubikigitaj ankoraŭ kelkaj tradukoj far aliaj personoj, ĉebezzone eblas uzi tiujn, sed estas tute ne multaj.

... Ĉi jare mi iĝis pli aĝa ol mia Instruisto Andrej Borisoviĉ Rogov en la jaro de lia forpaso. Ĉu multajn pliajn vivojarojn donacos al mi la destino – mi ne scias. Sed mi estus ege kontenta, se la revo de Rogov realiĝu dum mi estas viva, mi volus tuŝi per miaj manoj presitan Ukrainan Antologion, foliumi, legi, ĝui. Kelkaj personoj krom mi el la listo de Rogov nuntempe vivas kaj restas, miaopinie, laborkapablaj. Estas kelkaj junaj talentuloj-esperantistoj, aldonindaj al la listo ĉe ilia konsento kunlabori... Mi devas diri, tamen, ke organiza parto de la afero, certe kaj sendube, devas esti en la manoj de la ukrainaj esperantistoj. Sed se vi, karaj, bezonos mian helpon pri tradukado, redaktado, konsilado – pri tio, kion mi kapablas kaj spertas fari – mi volonte aliĝos al via laboro.

Mikaelo Bronŝtejn

Suplemento: Kelkaj tradukoj de Rogov.

Руданський – Співомовки

Господар хати

Мужик лиха наробив,
а жінки боявся, –
туди-сюди по кутках
та й під піч сховався.

Та лопатою під під:
– А вилізай, враже!
А той далі у куток
та й до неї каже:

Геть, погана сатано!

Геть, бісова мати!

Тепер мене не займай,
я – господар хати!

Олександр Олесь

В години розпачу

Візьміть мене, хмари,
на крила свої;
То ж тюрми, і ярма
і гніт на землі...
В сльозах мої сестри,
і браття в кайданах, -
півкряу в курганах.

Ми бились шалено,
як гірські орли,
але вороги нас
в полон узяли
і кинули бранців
за мури, за ґрати
кати і пілати.

Certa vir' kondutis mave,
kaj sin kaŝis time
for de la edzin' kolera
sub forno, kutime.

Ŝi fosilon tien ŝovas:
– Elrampu, viraĉo!
Li, skuiĝas en angulo,
diras kun malplaĉo:

For! Diablo vin forprenu!

Lasu min, satano!

Sciu, ke de nun mi estas
mastro de l' kabano!

Vi prenu min, nuboj,
sur via flugil';
ja ĉie prizonoj,
la prem' de ekzil'...
En larmoj gefratoj,
popol' katenita,
per sang' duonlando kovrita.

Ni agle batalis,
ni luktis fidele,
sed la malamikoj
nin kaptis kuele
kaj ĵetis kaptitojn
post muroj kaj kradoj
buĉistoj, pilatoj.

І знову народ наш
у владі катів,
і знову народ наш
в сітях павуків,
що кров його теплу
віки випивають,
тіла розпинають.

Візьміть мене, хмари,
в безкраю блакить –
я з скаргами хочу
до Бога летіть...
Коли ж він не вислуха
скарги народні,
я кинусь в безодні...

Юрій Федькович

Пречиста діво, радуйся, Маріє

У сине море сонце ясне тоне
і свое світло, ніби кров, червоне
по всій країні доокола сіє;
А там зозулку в гаю десь чувати,
а там дзвіночок став селом кувати,
там в борі вітер листом шелевіє:
Пречиста діво, радуйся, Маріє!

Он молод жовняр ляг си на мураві,
личко студене, шати му кроваві –
розстрілен нині, бо самий не вміє...
Камраття яму темну му вкопали
і на спочинок бідного в ню склали.

Уже не скаже, як дзвінок запіє:
Пречиста діво, радуйся, Маріє...

Denove l' popolo
en malliberejo,
denove l' popolo
en ret' aranea.
Jarcentoj la sangon
popolan gustumas
kaj korpojn krucumas.

Ho, prenu min, nuboj,
en altan ĉielon –
mi flugos kun plendoj
al Dio, al hela.
Se li ne aŭskultos
la plendojn popolajn,
abismo alportos konsolon...

En bluan maron dronas suna helo,
fariĝis sanga lumo en ĉielo,
ruĝiĝis preskaŭ tuta lando mia.
Kaj en la bosk' aŭdiĝas la kukolo.
Sonorileto tintas en vilaĝ' en solo.
En bosko vento ludas kun folio;
Vi ĝoju, sankta virgulin' Maria!


Jen kuŝas sur herbej' soldat' junaĝa,
en sang' la vesto, fridas la vizaĝo.
Li mortpafita kuŝas – morto tia...
Amikoj tombon fosis en silento
por la ripoz' eterna post turmento.

Jam ne rakontos li pri vivo sia...
Vi ĝoju, sankta virgulin' Maria...

Mikaelo Bronŝtejn



Poŝtelefono estas ja atingo,
sed mi bedaŭras, ke nuntempe min do
ĉiumomente iu rajtas voki,
senhumorigi, embarasi, ŝoki,
aŭ feliĉigi, laŭdi kaj aprezi,
tamen eĉ tio min komencas lezi,
ĉar ĉio ĉi, mi devas diri veron,
intencas tute ŝteli la liberon,
kiun mi ĝuis en epok' trankvila –
sentelefona kaj senkomputila.
Do petas mi vin, geamikoj bonaj:
Min voku nur, se urĝas la bezonoj,
Sed ve' – ne en manĝejo, necesej',
Nek, se l' aferon danĝerigas plej
Alvoko via: dum batadas koro
Kun hasta ĝu' ĉe l' pinto de amoro!



CERBE kaj KORE

n-ro 15 (83), junio 2020

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 113

[eksa Bulteno de REU (BdR)]

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio"
*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe
de ĝusta indiko de la fonto*

Ckk atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al **Nikolao Gudskov** nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio
